

# BEOGRADA VERDA STELO

Jaro V

Beogrado, januaro-aprilo 2010

n-ro 1(11)

## BEOGRADA VERDA STELO MATURIĜIS

Pasintjare ĝi estis registrita ĉe „British National Library“ („Brita nacia biblioteko“). Same, nia gazeto estas legebla en la reto ĉe *gazetejo.org*. En tiu paĝaro oni povas legi kaj elŝuti ĉiujn numerojn de „Beograda verda stelo“.

Pasintsemajne ni registris nian revuon ĉe nia „Narodna biblioteka Srbije“ („Serba nacia biblioteko“) en Beogrado.

Komenco de aperado de BVS estis antaŭ kvar jaroj. Ĉi-jaro estas la kvina jaro de aperigado. En pli novaj numeroj estas malpli da tekstoj en la serba lingvo, nia revuo iom post iom fariĝas pure esperanta.

En ĝisnunaj numeroj aperis ĉirkaŭ ducent originalaj kaj tradukitaj tekstoj, multaj informoj pri la aktiveco de esperantistoj, reagoj de legantoj kaj speciala kongresa numero, kiu enhavas fakajn tekstojn.

Eldonkvanto ankoraŭ estas modesta. Oni presas ĉirkaŭ cent ekzemplerojn kaj elektronike sendas dekon da ekzempleroj.

Nia revuo maturiĝis. Sed, ĝiaj kunlaborantoj kaj legantoj estas bedaŭrinde tro maturaj – statistike nia legantaro estas pli ol kvindekjaraĝa.

La tria kongreso (de la 25-a ĝis la 27-a de junio) estas preparata kaj ni esperas, ke ĝi estos sukcesa. Sed, ĝis nun aliĝis malpli ol cent partoprenantoj. Ni esperas, ke estos pli da ili.

Por la kongreso ni preparas novan specialan numeron de BVS, kiu enhavos ĉiujn fakajn prelegojn de la faka parto de la kongreso.

*d-ro M. Stojanović*

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado  
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumentoj  
Prezo: 90 din. unu ekzemplero, 250 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),  
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko  
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)  
Aperas trifoje jare

---

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Etelka Kiš - Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

# Originala prozo

Велибор Симовић

## МОЈ ДЕДА – ЖИВОТА СИМОВИЋ

Имао је тешко детињство. Због очеве смрти није могао да заврши основну школу него само три разреда. Био је врло млад кад је почео I светски рат.

Онда је препешачио преко Албаније, сасвим гладан, рањен на Солунском фронту, лечио се у Бизерти, па од Солуна до Загреба, пешачио под оружјем и у борбама, а оданде кући – у Шумадију, у Рајковац опленачки<sup>1</sup>.

Поклонио је цркви велико поверење и разочарао се. Потражио прибежиште међу комунистима, али се и онде „угрувао“. Кад је „постао власт“ свашта су радили у његово име. И онде су главну реч водили неки лажови, лопови и разбојници. Једно су идеје, а друго злоупотребе у име идеја! Његови идеали су били – да се више не праве будалаштине, као што су ратови, принудне мобилизације, малтретирања, погибије и стрељања оних који покушају да утекну или да избегну пакао који им се намеће: да подли нељуди не искоришћавају недужан народ.

Често је говорио како је био учесник I светског рата, а кад је почео II светски рат – мобилисан и он и његов син. На почетку окупације Југославије запалио је општинску архиву која је онда била у селу Маскару.

У току рата је стављен на листу талаца па је морао да одлази у Тополу – да се јавља властима. Ови одласци су коришћени и за доношење поште. Он је ову обавезу користио да прегледа приспелу пошту па је открио потерницу коју су Немци расписали за Шанетом. На потерници је била његова фотографија у варошком оделу. Деда му је дао сукнени гуњ и панталоне свог сина, да се не би разликовао од осталих сељака.

Пред крај рата нашао се у Тополи – на дужности руководиоца у ратној милицији. Имао је на располагању радио-пријемник, па је, међу првима, примио вест о паду Берлина. Ову вест је објавио рафалом кроз прозор своје собе – из заробљеног немачког шмајсера. Карађорђевићи вероватно не знају да је ову вест разгласио лупањем у највеће звоно цркве на Опленцу.

---

<sup>1</sup> У Шумадији су два Рајковца – један код Тополе – опленачки и један код Младеновца – космајски. Према етимологији – имена су им настала према личној имену, а оно лично име изведено из имена Рај. Истине за вољу – ова села се налазе на врло пријатним местима.

Пред крај рата, а нарочито у првим поратним данима – велики број четника је прешао у партизане, међу њима и неки озлоглашени насилници и убице. Кад је открио да се неки увлаче и у редове Комунистичке партије, а неки запоседају и руководеће положаје – покушао је да пружи отпор, али кад није успео – иступио је из Партије.

Откад се повукао – два пута су га стрпали у затвор – први пут зато што није имао да испоручи обавезне вишкове хране, други пут као информбировца.

Пре оне године била је родна година па је испоручио много више него што је био обавезан, а кад је, због суше, род подбацио па није било довољно ни да се прехрани породица – био је ухапшен. Раздужио се уступањем имања у СРЗ (сељачку радну задругу). Догматски „марксистички“ нису читали Лењина или нису уважавали његову поруку: „Немојте никога батином да нагоните у рај.“

Од деде сам чуо коментар, у стиху:

Нема више: „Господине...

Дрвене су осовине,

Окука је јака –

Удри на сељака!“

Нису ми се свиђали јетки, али умесни, стихови које сам слушао од сељака:

Моје не дам,

Туђе дизам...

Таки волим комунизам!

Беда је и раније водила главну реч у нашој породици, али онда паклени односи су утицали на мене да кујем планове – како да се избавим. Видео сам решење у школовању. Сва породица је била жртва мог „избављења“. До сада су сви, сем мене, поумирали, а ја се осећам као избеглица. Био сам у Савезу комуниста 33 године, али узалуд. Онде није био обичај да се критикују „непогрешиви“.

Нисам имо разумевања за дедину пргавост, али се сада чудим – како је успевао да ипак остане довољно приступачан. Чак је скрето пажњу за случај свађе:

– Што јаче удараш – то више одскаче.

Понекад се поигравао речима.

Он ме упознао с француским језиком онолико – колико је и сам знао – научио дружећи се са француским војницима на Солунском фронту и у болници – у Тунису. Осећао је велико поштовање према Француској зато што је све дала (а Србија само – живо људско месо). Често ми је говорио: „Немој много д’ учиш! Што више будеш знао – више ћеш да патиш.“ У свој својој интелегентној простодушности он је веровао да је знање – сво оно школско

лицемерје, глупости и шиканирање, јер није имао прилике да завири у онај пакао. Често је понављао виц о здрављу:

– Разболим се ја – каже он – па одем код лекара. Он ми напише рецепис, за лекове. Ја му платим. Треба човек од нечег да живи.

Одем код апотекара. Он ми дâ лекове, а ја му платим – треба и он да живи. Успут бацим оне лекове – треба и ја да живим.

Имао је обичај да се руга ћурану овако:

„Отићи ћу чак, чак, чак,  
И попићу каву, каву, каву.“

Слао ме да се попнем на буре и „'ајдуком“ (правом натегом) извучем бардак ракије. Кад сам се једанпут придржао за натегу и одломио је, био сам изненађен што нисам кажњен, него ми деда направио флауту од одломљене цеви натеге. Његов коментар је био:

– Не удри циганче кад разбије тикву. Касно је. Треба га научити – како да не разбије.

Ја нисам умео да свирам. Он јесте. Његов отац је свирао „у кланет“. Остао је запис да је у Аранђеловцу, неки сељак свирао „у кланет“ док се играло коло на ћуприји преко Кубршнице, све док се ћуприја није срушила.



Velibor Simović

## MIA AVO – ŽIVOTA SIMOVIĆ

Li havis malfacilan infanaĝon. Pro la morto de sia patro li ne povis fini elementan lernejon, sed nur tri klasojn. Li estis tre juna kiam komenciĝis La 1-a mondmilito.

Tiam li piediris trans Albanio, tute malsata, vundita en tesalonika fronto, saniĝis en Bizerto, kaj – de Tesaloniko ĝis Zagrebo, li piediris portante armilojn kaj batalante. De tie li piedpaŝis hejmen – en Ŝumadio, en Rajkovac oplenaca<sup>1</sup>.

Li donacis al la eklezio grandan konfidon kaj senreviĝis. Li serĉis rifuĝon inter komunistoj, sed ankaŭ inter ili li „maltrafis“. Kiam li fariĝis „potenca“ ĉion iuj faris je lia nomo. Ankaŭ tie ĉefan vorton havis iuj mensoguloj, ŝtelistoj kaj rabistoj. Unu afero estas ideoj kaj alia misuzoj je la nomo de ideoj! Liaj idealoj estis – ke oni ne plu oni faru malsaĝaĵojn, kiaj estas militoj, perfortaj mobilizoj, molestadoj, pereado kaj mortpafado de tiuj, kiuj provus fuĝi aŭ eviti la inferon kiun oni al ili altrudas; ke insidaj malhomoj ne ekspluatu senkulpan popolon.

Ofte li parolis, ke li estis partoprenanto de la 1-a mondmilito, sed kiam komenciĝis la 2-a mondmilito – estis mobilizitaj kaj li kaj lia filo. En la komenco de okupacio de Jugoslavio li bruligis komunuman arkivon, kiu tiam estis en la vilaĝo Maskar.

Dum la milito li estis sur la listo de garantiuloj kaj li devis foriradi en Topola – anonci sin al potencularo. Tiuj foriroj estis uzataj por alportado de poŝtaĵoj. Li tiun devon uzis por trarigardo de alira poŝto, kaj li malkovris arestomandaton kiun Germanoj dissendis por kapti Ŝaneon. Sur arestomandato estis lia fotografio en urbana vestaĵo. La avo donis al li gunj<sup>2</sup> el sukno<sup>3</sup> de sia filo, ke li ne diferencigu de aliaj vilaĝanoj.

Antaŭ la fino de la milito li troviĝis en Topola – en la funkcio de estro en milita milico. Li disponis radio-akceptilon, kaj li, inter la unuaj, ricevis la informon pri falo de Berlino. Tiun informon li anoncis per rafalo tra sia fenestro – el kaptita germana maŝinpafilo. Dinastio Karaĝorĝeviĉ probable ne scias ke tiun informon li diskonigis per la plej granda sonorilo de preĝejmaŭzoleo sur Oplenac.

Antaŭ la fino de la milito, kaj precipe en la unuaj postmilitaj tagoj – granda nombro da ĉetnikoj transiris ĉe la partizanoj, inter ili multaj malbonfamaj perfortuloj kaj murdistoj. Kiam li malkovris ke iuj eniĝas en

---

<sup>1</sup> En Ŝumadio, okcidente de Morava rivero, dekstra enflua rivero de Danubo, ekzistas du vilaĝoj nomataj Rajkovac – unu ĉe Topola – oplenaca, kaj unu ĉe Mladenovac – kosmaja. Laŭ etimologio – iliaj nomoj ekestis laŭ persona nomo, kaj tia nomo estas derivita el substantivo Raj (=Paradizo). Verdire – tiuj vilaĝoj situas en tre agrablaj lokoj.

<sup>2</sup> “Gunj” estas kitelo farita el “sukno” farata en la domo de vilaĝano kaj ornamita per ornamoj el pasamento. Tian vestaĵon vilaĝano, se tiu ĝin havis, uzis nur en solenaj okazoj. Ĉiutage li portis nur ĉifonitajn vestaĵojn.

<sup>3</sup> “Sukno” estas kruda lanŝtofo farita en domoj de vilaĝanoj, en primitiva teksilo, kaj poste rulpremita de rulpremanto en primitiva rulpremito.

la vicojn de Komunista partio, kaj iuj akiras estrajn poziciojn – li provis rezisti, sed kiam li ne sukcesis – li eliris el la partio.

De kiam li retiriĝis – du foje li estis arestita – la unuan fojon ĉar li ne havis eblecon liveri la devigan kvanton da nutraĵo, la duan fojon, kiel informburoano.

Antaŭ tiu jaro estis fruktodona jaro kaj li liveris multe pli ol li devis, sed kiam, pro la sekeco la produktokvanto etis tre modesta kaj estis eĉ ne sufiĉa por nutri la familion – li estis arestita. Li senŝuldiĝis donante sian bienon en KLK (kampanan labor kooperativon). Dogmatismaj „marksistoj“ ne legis verkojn de Lenino aŭ ili ne konsideris lian mesaĝon: „Neniun pelu en paradizon per bastono.“ De la avo mi aŭdis komenton, versoforme:

Ne plu estas: „Sinjoro...“

Lignaj estas aksoj,

Vojkurbiĝo forta –

Frapu la kampanon!

Al mi ne plaĉis koleraj, sed taŭgaj, versoj, kiujn mi aŭdis de kampanoj:

Mian mi ne donas,

De alia mi forprenas...

Tia al mi plaĉas komunismo!

Mizero ankaŭ ĝis tiam regis en nia familio, sed tiam inferaj rilatoj influis min, ke mi intencu trovi solvon – kiel saviĝi. Mi vidis solvon en lernado. La tuta familio estis viktimo de mia „savo“. Ĝis nun ili ĉiuj, krom mi, estas forpasintaj, kaj mi min sentas kiel rifuĝinto. Mi estis membro de Ligo de komunistoj dum 33 jaroj, sed vane. En ĝi ne estis kutimo kritiki „senerarajn“.

Mi ne estis komprenema por koleremo de la avo, sed mi nun miras – kiel li sukcesis tamen resti sufiĉe alirebla. Eĉ li atentigadis okaze de kverelo:

– Ju pli vi batas – des pli ĝi forsaltas.

De tempo al tempo li ludis per vortoj.

Li konigis min kun la franca lingvo tiom – kiom li mem sciis ĝin – kiom li lernis dum amikado kun francaj soldatoj en tesalonika fronto kaj en hospitalo – en Tunizio. Li sentis grandan estimon rilate al Francio, ĉar ĝi ĉion donis (kaj Serbio nur – vivan homan karnon). Ofte li diris al mi: „Ci ne lernu multe! Ju pli ci scios –des pli ci suferos.“ En tuta sia inteligenta naiveco li kredis ke scio estas ĉiu lerneja hipokriteco, stulteco kaj ĉikanado, ĉar li ne havis la okazon ekrigardi en la menciitan inferon. Ofte li ripetis la ŝercon pri sano:

– Mi malsaniĝas – diras li – kaj mi iras al kuracisto. Li al mi skribas recepton por sanigiloj. Mi pagas ĉar li devas vivi de io. Mi iras al apotekisto. Tiu al mi donas sanigilojn, kaj mi al li pagas – devas ankaŭ li vivi. Irante hejmen mi forĵetas la medikamentojn – ankaŭ mi devas vivi.

Kutimis li primoki al meleagro ĉi tiel:

„Mi foriros eĉ, eĉ, eĉ,

Kaj mi trinkos kafon, kafon, kafon.“

Li sendis min grimpi sur barelon kaj per „'ajduk“ (rekta ĉerptubo por likvaĵo)<sup>1</sup> ke mi eltiru boteleton de brando. Kiam mi foje apogis al ĉerptubo kaj rompis ĝin, mi estis surprizita ĉar mi ne estis punita, sed la avo al mi faris fluton el rompita ĉerptubo.

Lia komento estis:

– Ne batu ciganidon kiam ĝi rompis kukurbon<sup>2</sup>. Oni devas ĝin kapabligi – ne rompi.

Mi ne scipovis muzikludi. Li sciis. Lia patro muzikludis „kla'neton“. Restis priskribo, ke en Aranĝelovac, iu kamparano muzikludis „kla'neton“ dum aliaj ĉirkaŭdancis sur la ponto trans Kubrŝnica, ĝis kiam la ponto ne detruigis.



---

<sup>1</sup> Oni faras ĉerptubojn el iu speco de kukurbo kiam ĝi estas tute matura, seka kaj sufiĉe dura.

<sup>2</sup> Ekzistas speco de kukurboj taŭga por fari akvujojn, kaj vinujon – el tria speco de kukurbo. Tiun ujon oni nomas „vrg“. Vinujo ricevas ruĝan koloron el vino, kaj oni diras: „Ruĝas kiel vina vrg.“ – ke esprimu – kiel estas sana iu persono.



SERBA POPOLA FABELO  
**DIABLO KAJ SANKTA SAVAO**  
(Adaptis por ludi Jadranka Miriĉ, Zajeĉar)

*(Sur scenejo videblas Sankta Savao piediranta monton. Al lia direkto iras Diablo. Ĵus vidinte sanktulon Diablo ektimis provinte sin kaŝi, sed malsukcese. Do, ili renkontiĝis survoje.)*

SANKTA SAVAO: Dio helpu al vi!

DIABLO (*malice*): Ĉu vi zorgas pri tio.

SANKTULO: Kiel vi fartas?

DIABLO (*kolere*): Ĉu vi vere zorgas pri tio?

SANKTULO (*pace*): Kien vi iras?

DIABLO (*daŭre kolere*): Nek pri tio vi estu zorgema!

SANKTULO: Kion vi faras?" (*per milda voĉo provis li senkolerigi la diablon*).

DIABLO (*ĉi-foje iom suspekta*): Eble, se mi havus iom da kampo mi okupiĝos pri legomkulturado.

SANKTULO: Bone, Vi elektu min kiel kompanianon. Ni kunlaboros. Ni konsentos kion ni semos, kion kulturos, kion ni rikoltos.

DIABLO (*denove kolere*): Ho, estas klare ke vi min malestimas. Mi volas ke ni subskribu kontrakton inter ni.

SANKTULO kapjesis kaj ili subskribis la kontrakton..

SANKTULO (*saĝe*): Unue, ni semos cepon! Kiam la cepo elkreskos kion vi elektu: tion, kio kreskas subtere aŭ tion, kio estas super la tero?

DIABLO (*gaje, frotante siajn manojn*): Kompreneble tion, kio kreskas super la tero, belegajn verdaĵojn.

SANKTULO (*senriproĉe*): Bone, vi mem elektis tion. Poste ne demandu de mi pardonon, nek mi volas aŭdi plendadon! Vi scias ke post la semado devas pasi kelkmonatoj por rikolti, kion ni semis.

DIABLO (*kolere*): Mi diris kion mi elektos, sed mi suspektas, verdire, ke vi min trompis. Ja, belegaj verdaĵoj velkiĝos. Restos cepo subtere, ĉu ne?

SANKTULO (*ridete*): Jes, sed vi pripensu alifoje pli bone antaŭ la respondo!

DIABLO (*turniĝis ĉirkaŭe atendante novan proponon*): Ĉu vi konsentas, ke ni semu brasikon. Vi scias kiom belegaj kaj grandaj estos kapbrasikoj!

SANKTULO (*jesis per kapo*): Mi elektos ilin, do tion kreskanta super la tero.

DIABLO (*malice ridis*): Ja, kion mi faru kun verdaĵo, mi volus rikolti tion, kio kreskas subtere.

Sanktulo nenion diris ekpensante, kiom malplenkapa Diablo estas aŭ tio estas ia malracia Diabla afero.

SANKTULO (post paŭzo): Do, kaj tion ni solvis. Ĉu vi konsentas ke ni semu terpomojn!

DIABLO (pli afable): Jes. Mi elektos tion kio elkreskos super la tero. Mi ne volas erari ĉi-foje.

SANKTULO: Bone, ne ridu. Ĉu vi ne konas la proverbon kiu lasta ridas, ridas plej bele. Kion ni faros kun tritiko? Elektro estas via.

DIABLO: Mi elektos tion kreskantan subtere. Ni semu semojn de tritiko.

SANKTULO (*klarigante al li*): Ĉu vi forgesis, kiam ni semas tritikon post ĝia rikoltado la laboro ne estas finita. Ni devos ĝin alporti al muelilo por ricevi farunon. Al vi restos nur fojno.

DIABLO (*kolere ekkriaĉegis*): Mi ne volas plu kunlabori kun vi. Vi trompis min. Mi volas disrompi nian kontrakton!

SANKTULO (*pace*): Jen, lastfoje mi proponas al vi ke ni semu vinberojn. Ĉu vi deziras sukcon aŭ vinberojn – surfundaĵojn?

DIABLO (pripensis iomete kaj elektas surfundaĵojn): Ja, mi finfine venkis vin. Mi prenos surfundaĵojn aldonos akvon kaj mi ĉion banos en granda kaldrono. Do mi ricevos brandon!

SANKTULO: Mi ricevos vinon, kaj vi faros brandon, vere vi venkis min, kaj li kunpremis siajn tri fingrojn por krucsigni.

*Vidinte kion li faris, la Diablo ekfuĝis kolere kaj hontinde ekflustrinte. Brando estas medicino al maljunulo, sed furiozo al junulo.*



# *Originalala poezio*

*Jelena Tončić, Leskovac*

## **ALIULINO**

Iu alia ino  
nun aŭskultas flustron  
de montaraj fontoj  
de via animo.

Iu fremda cigaredo  
ardas en mallumo  
de via tempo  
de feliĉo.

Iu fremda mano  
mortigas brilon  
de viaj okuloj  
spite al la mondo.

*Јелена Тончић, Лесковац*

## **ДРУГА**

Нека друга  
сада слуша шапат  
планинских извора  
твоје душе.

Нека туђа цигарета  
жари се у тами  
твог времена  
среће.

Нека туђа рука  
убија сјај  
твојих очију  
у инат свету.

Благица Петровић  
После „А“ курса у Нишу

## ЕСПЕРАНТО

Есперанто је светски  
то знаде свак  
разумљив и јасан  
као сунчев зрак

По целом свету  
свугде га има  
са њим је лакше  
верујте свима

Богатством израза  
он људе спаја  
од наше Авале  
до Хималаја

Овај је покрет  
свих језика збир  
Есперанто је добар  
као светски мир.

Blagica Petrović  
Post „A“ kurso en Niŝo

## ESPERANTO

Esperanto estas monda  
ĉiuj scias tion  
racia, facila  
kiel sunradio

Tra la tuta mondo  
ĉiuj havas ĝin  
per ĝi estas pli facile  
vi kredu min

Per riĉeco de vortoj  
kunligiĝas homoj  
de nia Avalo  
ĝis Himalajo

Ĉi tiu movado  
de ĉiuj lingvoj donaco  
Esperanto estas bona  
kiel monda paco

# Tradukoј

Војислав Илић Млађи

## ЉИЉАНА

Уплакана мала Љиљана се враћа  
У собу из баште, где јој лутка паде.  
„Ништа!“ каже мати...пажњу не обраћа  
На те ситне дечје невоље и јаде.

Ал' срце, к'о восак, нежне је суштине:  
Најмање га такнеш – отисак остане...  
И детињске сузе имају горчине:  
И ране детињства то су ипак ране!

Ја пољубим малу...и сав јад пролети!  
Но, пре но што златна птичица одлети,  
Своју дужност кћери нипошто не смеће,

Већ пољубац, смешке, на чело ми ставља,  
И мени тај зрачни пољубац приправља  
Тренутак земаљске најчистије среће.

(1921)



Vojislav Ilić, la pli juna

## LJILJANA

Larma etulino Ljiljana revenas  
Al ĉambro, ĉar pupo falis el ĝardeno.  
„Bone!“ diras panjo...larmoj ŝin ne ĝenas  
Tio estas eta infana ĉagreno.

Sed koro, kiel vaks', havas subtilecon:  
Plej ete ĝin tuŝu – la premsigno restas...  
Kaj infanaj larmoj havas amarecon:  
Infanecaj vundoj tamen vundoj estas!

Mi kisas la etan... kaj gal' preterflugas!  
Sed, antaŭ ol ora birdeto forflugas,  
Ŝi filinan devon tute ne forgesas,

Sed kison, kun rido, sur frunton ŝi metas  
Kaj al mi la kison radian ŝi ĵetas  
La plej pura ĝojo tiam min karesas.

Tradukis P. Marinković



## Jorgos Seferis

(Turkio, Smirna 1900 – Greklando, Ateno -1971)

Nobelpremiito (1963).

Poemkolektoj:

"Turmomento" (1931); "Cisterno" (1932); "La mita historio" (1935); "Legendoj" (1935); "Gimnopedio" (1936); "Kajero por ekzercoj" (1940); "La ŝiptaglibro I" (1940); "La ŝiptaglibro II" (1944); "Turdo" (1947); "La ŝiptaglibro III"; (1955); "Poemoj" (1951, 1961, 1963); "Tri sekretaj poemoj" (1966).

Eseoj:

I-a eldono 1944; II-a eldono 1962.

Li tradukis en la grekan lingvon plurajn verkojn de anglaj kaj francaj aŭtoroj.

## MIKENO

Etendu, etendu, etendu al mi la manojn.

Vidis mi dumnokte  
akran montpinton  
vidis mi kampon apud ĝi inunditan  
per lumo de l' nevidebla luno  
vidis mi, turninte la kapon,  
nigrajn arigitajn ŝtonojn  
kaj mian vivon kordstreĉitan  
komencon kaj finon  
la finan momenton:  
miajn manojn.

Dronas ĉiu kiu ekmovas grandan ŝtonaron:  
ĉi-ŝtonaron mi movadis kiom ajn mi povis  
ĉi-ŝtonaron mi ŝatis kiom ajn mi povis  
ĉi-ŝtonaron, mian sorton.  
Disvundis min la propra lando  
turmentis min la propra ĉemizo  
kondamnis min miaj propraj dioj,  
ĉi-ŝtonaro.

Mi scias ke ili ne scias, sed mi  
kiu pasis tiom da fojoj

de murdinto al viktimo  
de viktim' al puno  
kaj de puno al alia murdo,  
palpante  
senĉerpan porfiron  
tiuvespere dum reveno  
kiam erinioj komencis sibli  
en herbar' maldensa –  
mi vidis serpentojn buliĝintajn kun vipuroj  
plektitajn super viva idaro  
nia sorto.

Voĉoj el ŝtono post la sonĝo  
pli profundaj kie mond' mallumiĝas,  
rememor' pri sufero, eniĝinta en ritmon  
kiun altere batadis la plandoj  
forgesitaj.  
Korpoj dronintaj en fundamentojn  
de l'alia tempo, nudaj. Okuloj  
fiksitaj, fiksitaj al signo  
kiun oni spite al volego ne povas apartigi:  
animo  
kiu batalas por estiĝi la via.

Eĉ silento ne plu estas via  
ĉi-loke kie ĉesis turniĝado de muelŝtonoj.

Oktobro 1935

*Esperantigis Boriša Miliĉević*

## Janis Ricos



(Greklando, Monemvasia 1909 – Ateno 1990)

Laŭreato de Poezivesperoj de Struga (1985).

Poemkolektoj: "Traktoro" (1934). "Piramidoj" (1935), "Epitafo" (1936), "Oceana marso" (1940). "Malnova mazurko en pluvritmo" (1942). "Ekzameno" (1943), "Makronisos" (1949), "Maldormo" (1954), "Aŭrora stelo" (1955), "Lunsonato" (1957); "Nevenkita urbo" (1958); "Morta domo" (1962); "Helenismo" (1966) k.a.

Dramaj poemoj: "Filokteto", "Oresto", "Muro en spegulo", "Atestoj", "Koridoro kaj ŝtuparo" k. a.

Verstradukoj: A. Blok, I. Erenburg, N. Hikmet. V. Majakovski k. a.

### LA RADIKOJ DE LA MONDO

Iom da kano brulita sub aksel' somera,  
iom da satureo, timiano, filiko.

Ni eksoifis ege.  
Ni ege ekmalsatis.  
Ni ege suferis.

Ni kredis neniam  
ke tiom furiozas la homoj.  
Ni kredis neniam  
ke tiom elteneblas nia koro.

Kun ero da morto en niaj poŝoj – nerazite.  
Kieas la spikoj por sian tigon al la ĉiel' donaci?

Mallumiĝas malrapide.  
Ombro ne kaŝas la krudon de l' Ŭtono.  
Ladbotel' de l' morto en sablon enfosita.  
Lunlumo ankrita ĉe iu alia bordo  
turnadis la silenton etfingre –  
al kiu bordo? al kiu silento?

Ni eksoifis ege  
ĉe la tagnokta prilabor' de l' ŝtono.  
Sub soifo nia  
estas mondradikoj.

*Esperantigis: Boriša Milićević*



Simo Matavulj (1852-1908)

## **BAKONJA FRAT'-BRNE** **(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

*(dekunua parto)*

### MULTAJ MALSAMECOJ

Ekestis granda silento, kiel okazadas post grandaj skuegoj. Brne dek tagojn kunmetadis cirkuleron, destinitan al ĉiuj monakejoj kaj katedraloj, en kiu estis detale priranktitaj la malbonoj kiuj okazis en la domo de la s. Frane, kaj per kortuŝigaj vortoj li petis la fratecan helpon. Tiu longa letero devis esti dissendita en ducento da kopioj, sekve ĉiu, escepte de Vostvolvulo, skribadis po tutan tagon. Korpulentulo ellernis parkere la tutan cirkuleron, de vort' al vorto.

La kruela Todorina devis ruktadi, tiom multe lia nomo estis menciata en la monakejo, en parokoj, sur tribunalspaperoj kaj ĉie kien la cirkulero alvenis; li devis, se nenion alian, sonĝi malbelajn sonĝojn, tiom multe da malbenoj estis direktite al lia granda kapo. Krom la malbenoj, oni destinis ankaŭ la ĉantaĝon de 300 taleroj por la menciita kapo, ĉar oni certe sciis ke Kruĉegulo troviĝas en montaro kun Radek-bando. Koncerne la oraĵojn kaj arĝentaĵojn, oni konjektis ke ili pasis tra la manojn de iu negocisteto, en la proksima urbeto. La tribunalo traserĉis la domon de tiu viro kaj enkarcerigis lin por kelka tempo, sed, fine ĝi devis liberigi lin,

Kaj tiel, iom post iom, dum du monatoj, malaperis la esperado ke oni povos rehavigi iun ajn el la forŝtelitaj objektoj.

Kaj ankaŭ la cirkulero aliris malmultan reekon. Plejparte alvenadis malgrandaj monkontribuaĵoj, akompanataj per longaj skribkompatoj, aŭ la preĝejaĵoj kiuj estis superfluaĵoj al la sendintoj. Vere, honestiĝis la monakejaj tonsuritoj, troviĝantaj en parokoj. Ili sep egaleciĝis kaj aĉetis kvar grasajn bovinojn ("ke estu lakto, siĉjo") kaj du ŝarĝĉevalojn. Nur frat'-Avarulo Ĉuk, Ĉimavica-onklo, ne konsentis pri la egaleca sumo, sed eĉ sendis leteron, plenan de riproĉoj al la nova monakejestro, kulpigante la fratojn ke ili ne trafas atentis la bienojn de la s. Frane.

Tio multe influis frat'-Brne-n kaj tio, verŝajne, kontribuis ke lia malsano disvastiĝu el la dikfingroj en la piedojn. Tiu juna kuracisto el la urbeto preskribis al li kelkajn kuracgutetojn, sed sole, antaŭ Onklino kaj Balgo, li dubskuis la kapon.

Vere, tio estis iu stranga malsano! Tutan semajnon la doloroj estas for, kaj poste dum unu, du tagojn li ne povas eĉ piedstari. Frat'-Brne rapide konvinkiĝis ke la kuracgutetoj neniom helpas lin, sed ke la malsatado bonstatas al li. Tio estis enigma por li kaj tio kolerigis lin, pro kio li diris al Onklino:

-Kiun diablan ligan havas manĝado kun la piedoj, mi ne komprenas! Jen mi komprenas ke se stomako estas plena, ĝi tiam pli pezas kaj, sekve, la tuta korpo pli pezas al la malfortiĝintaj piedoj! Tio jes, sed mi provis ankaŭ tion ĉi: kiam, ekzemple, mi ne vespermanĝas, kaj la morgaŭan tagon fartas pli bone, mi tiam prenas du pezajn seĝojn kaj portadas ilin, laŭvole, duonhoron, sed ne malmovstaras por ke la korpopezo ne sentigu la artikojn! Do, vi vidas ke la afero estas nekomprenebla!

Kaj Onklino al li:

-Mia kara Brne, per la bona manĝado plifortiĝas la sango, kaj, sekve, plifortiĝas ankaŭ la malsano. Pro tio al vi precipe malutilas la posttagmanĝa dormado. Vi devas ne dormi eĉ momenton posttagmeze, tiel diris al vi la kuracisto.

-Ne bone ke mi manĝadu, ne bone ke mi dormadu posttagmanĝe, al kio mi alkiutiĝis de antaŭ tridek jaroj, kial mi tiam bezonas vivi! – diras Trogulo kolere. Poste pli milde: -Nu, ĉu estus bone, fraĉjo Dume, ke mi vivadu same kiel ĝis nun, kaj ke mi krome metadu pli ofte hirudojn, por maldensigi la sangon, he?

-Ha-a, diris Dume. Antaŭ ĉio ekrememoru tiujn orajn vortojn de la Salerna skolo al la angla reĝo: "Somnum fuge meridianum" (Evitadu tagmezan sonĝon – tradukinto).

-Ne menciu al mi, fraĉjo, tiun vian skolon! Interrompis lin frat'-Brne. Ne plu!

Pasis ne multe da tempo, kiam frat'-Brne fariĝis malserena kaj malzorgema pri ĉio. Mirindege, tio okazis dumsomere, kiam li ne nur ne sentis iajn ajn dolorojn, sed kiam li estis konvinkita ke li tute resaniĝis, kaj, sekve, jam ne moderiĝadis manĝe. Kaj li fariĝis stranga. Li ĉesigis siajn matenpromenadojn ĝis la porjunula kuirejo kaj sidadon en la ombro antaŭ la pordego, kaj komencis serĉadi solecon. Tutajn horojn li sidadis enestible, antaŭ sia ĉelo, rigide rigardante iun objekteton en la korto, kokojn aŭ katojn, kaj eĉ la fumon kiu serpentumadis el la kuirejo. Kiam iu ajn al li direktiĝadis, li tuj forfuĝadis kaj ŝlosadis sin de interne. Se tio

estis iu juna, kiu aparte venis por ricevi iun instrukcion, Brne plej mallonge diras kion li havas, de malantaŭ la pordo. Sporade li tion faradis sen ia ajn evidenta kaŭzo, t.e. fuĝante de neniuj. Dum tagmanĝoj kaj vespermanĝoj li paroladis nur tion plej necesan, sed ĉiu lia vorto estis lokĝusta, tiel ke la parolo neniom pruvadis ke li malsaĝiĝis. Eĉ kiam foje Vostvolvulo demandis lin:

-Kio okazas, patro Brne? Ĉu estas .... io alia... ĉu estas ia vermeto en la menso? Brne trankvile respondis:

-Mia menso estas, danke al Dio, sana, kaj mi ne devas konfesi: kio okazas al mi!

Aliokaze li respondis al Onklino:

-Mi troviĝas, fraĉjo Dume, en tiu stato, pri kiu parolas... mi nun ne scias ĉu Aŭgustino aŭ Akvitano... do, en tiu stato kiam homo sentas ke li havas nur haŭton, kaj interne kvazaŭ li estus plena de malpleno, kvazaŭ havunte nek ostojn, nek karnon, nek sangon, sed kvazaŭ li estus plena nur de aero...

-Mi tion ne komprenas, nek rememoras ke tion diris iu sankta patro, diris Onklino zorgoplene. Fraĉjo Brne, ne enigadu tiajn pensojn en la kapon.

-Mi diras al vi ke tion diris iu patro, kaj mi enigas neniujn pensojn en la kapon.

Ili ne plu parolis pri tio. Brne daŭrigis sian novan vivmanieron, kiun nur Korpulentulo detale sciis. Ĉar la onklo dumtage dormadis du-tri horojn, kaj dumnokte preskaŭ neniom, ekde vespere komencadis suferoj de Korpulentulo. La frat' unue longe aŭskultadis klakadon kaj tiktakadon de la horloĝo, poste ventrekuŝadis, dum Korpulentulo devis gratetadi liajn kruojn, dorson kaj traserĉadi lian kapon, kio tiel longe daŭradis ke Korpulentulo mem ĉesadis, sed tio ne pasadis senvorte. Poste la frat' provadis endormiĝi, sed, plej longe post unu horo, li leviĝadis kaj ekmarŝadis tra la ĉambroj, spirblovante kaj balbutante. Korpulentulo ŝajnigas sin dormanta, sed la frat' vekas lin kaj demandadas pri tio kio okazis dumtage, poste riproĉadis lin, poste genuadis kaj ekpreĝadis al Dio, kaj preĝigante ankaŭ lin. Foje li ordonis ke tiu elparolu tiun cirkuleron ellernitan de li parkere. Poste li tion postuladis regule ĉiunokte. Do, vidas Korpulentulo ke la frat' infaneciĝis; kaj Korpulentulo iĝis plenzorga, sed pri tio farata dumnokte li eĉ vorton ne diris al iu ajn.

Kaj la monekejanoj, iom post iom, al kutimiĝis al la strangaĵoj de la nova monakejestro, sed lia malatento pri la komunaj aferoj kvazaŭ estus transirinta al ili ĉiuj, ĝuste kvazaŭ ĝi estus infektinta ilin, kaj, sekve, ĉio ekiris malbone.

Ŝvelulo, vere, diligente sonorigadis la vekilon, kaj preparadis ĉion necesan en la preĝejo, sed matenpreĝo (Dio indulgu) estadis manĝpuŝita; post matenpreĝo, la monakoj tuj disiĝadis, sen kunveno kaj intersento; Ekskrementulo jam ne alrigardadis kio okazadas en la porjunula kuirejo, eĉ en sia kuirejo li tro apogadis sin al Korpulentulo; antaŭ la “instruhoroj”, la nova diakono kaj tri lernantoj sidadis po iom da tempo en la instruejo, kien la instruistoj pli ol ne venadis, - sed Korpulentulo avide legadis, ĝuste glutadis ĉion kion ajn atingadis liaj manoj, kaj sekve li mirigadis la kamaradojn kaj frat’-Onklinon per sia eksterordinara memoro, krom tio li kun amo instruetadis la malgrandan Ŝvelulon, pro kio frat’-Onklino komencis instruadi Korpulentulon pli amplekse en la latina. La tagmezaj instruhoroj daŭradis kelkajn momentojn, poste la monakoj tagmanĝadis silente kaj rapide kvazaŭ ili irus en armeon, poste ĉiu foriradis en sian ĉelon, nur Koleremulo rajdadis sian novan nigran ĉevalon, kaj ekiradis kun Strabulo transriveren...

Posttagmeze la lernantoj rekunvenadis en la “instruejaĉon” por kuŝetadi ĝis vespera sonorado; vesperpreĝon oni rapide finadis kvazaŭ por veto; vespermanĝo estadis ĉiam malbone preparita, ĉar en la komuna ĉagreno ankaŭ siĉjo Grgo ekserĉis konsolon en la glaseto, - “kio estas peko, sed tamen ne tia por ke oni ne povu pentofari ĝin”, kiel li diris al Korpulentulo, parolante pri la mortinta Funelo.

Ni vidis kiel estadis dumnokte en la ĉefa ĉelo, sed ankaŭ en la ceteraj ne estis regula stato.

Onklino, tuj post la sinŝlosado, bruligadis la pipon, marŝante poste tien-reen tra du ĉambroj. La viro fumadis, balbutis ion en si mem, trinkis akvon, kraĉetis, marŝadis kaj marŝadis, ĝis li falis lacega. Matene, kiam Ŝveluleto malfermadis la fenestrojn, la fumo ŝprucigadis tra ilin, kvazaŭ el la kameno. Brne foje milde konsilis lin:

Ne faru tiel, fraĉjo Dume, ĉar ankaŭ vi pereos antaŭtempe, - vi kiu scias parkere ĉiujn instruaĵojn de la Salerna skolo!...

Kaj Onklino malĝoje al li:

-Ne zorgu vi pri mia sano, fraĉjo Brne! Pardonu pro tio kion mi diros al vi, sed ekzistas pli urĝaj, multe pli urĝaj aferoj pri kiuj vi devus zorgi!

Bujas legadis al la onklo Betulo ĝis endormigante lin. Li legadis ion ajn, kaj preterlase, kaj inverse, nur por tumulti – same kiel iuj muelistoj ne povas endormiĝi se kapstano ne turniĝas.

La nova diakono Virkato havis pli malfacilajn aferojn kun la onklo Balgo, kiu po du horojn postvespermanĝe, longe, “trepadis” la piedojn en varmeta akvo kun brano, kaj poste la nevo “ĉiun duan horon” donadis al li iujn kuracgutojn kiuj malplifortigas la astmon, kaj iujn grajnetojn kiuj

malplifortigas dolorojn en la stomako, - ĉar la astma Balgo manĝadis vespere pli ol Trogulo, kaj sekve ĉiunokte kaptadis lin stomakdoloro.

La soleca Vostvolvulo eĉ ne eniradis en la ĉambron post vespermanĝo, sed promenadis, trinkante brandon kaj intermanĝante ajlon, kiel faras hajdukoj. Kiam li koleriĝadis, tiam li ŝanĝadis promenejon, marŝante antaŭ la monakejstra ĉelo, forte plankbatante per la kalkanoj. Tio Brne-n multe maltrankviligadis, sed li ne kuraĝis averti la malican Vostvolvulon.

La alia apartulo, Koleremeŭlo, interparoladis kun Strabulo. Ili ne nur dumnokte ne disiĝadis, kaj "vagegis al la farmuloj kiel vagabundoj" (kiel foje diris Vostvolvulo), sed ili ankaŭ dumnokte kundrinkadis en la ĉelo. Ĉar Koleremulo estis bonkora, foje Trogulo avertis lin ke lia konduto estas kontraŭ "la reguloj", kaj Koleremulo abrupte:

-Kiu ja ĉi tie sekvas la regulojn, fraĉjo Brne!? Ĉu mi haltu surmonte, kiam ĉio ekiris abismon? Kaj, fine, se vi malbonvolas ke mi kompanu kun la servisto, tiam donu al mi Korpu Kentulon kiu interparoligu min!...

Do, en la monakejo, kaj tage kaj nokte ĉio fluadis malbone.

La servistoj dume faradis siavole. Trtak kaj Boban, kiam kaptante tempon, senĉese enakvigadis fiŝkaptulojn kaj tial interdisputiĝadis kun Dundak kaj Beljan, kiuj asertadis ke ili havas plian rajton al fiŝkaptado, - aŭ Dundak kaj Beljan fruleviĝadis kaj okupadis pli bonajn lokojn, lasante la kontraŭulojn plendadi. Sed, tuj ekde vesperiĝo malaperadis ĉiu disputo, kaj ĉiuj, kaj forĝisto kaj muelisto, bovisto kaj ambaŭ veturigistoj, fratece sidiĝadis malantaŭ la porjunula kuirejo, rivervide, kaj "per sango de Jesuo Kristo" mildigadis la malĝojon pro la rabita preĝejo.

Unue oni miradis kio okazas nokte en la monakejo.

-Kio diable okazas al monakaĉoj, subite, nun kiam ĝuste estus tempo ke ili rekonŝciiĝu! Diris Boban. Fraĉjo, ili kvazaŭ ekfuriozis, eldiris Strabulo! Nu, kio povas esti?

-Mi pensas ke al ili reaperadas frat'-Funelo! Diris Dundak.

-Silentu, bestaĉo, se tio estus vero, ĉu li ne reaperus ankaŭ al vi, same kiel la mortinta Kaŭrulo? diris Trtak, okulsignante al la forĝisto.

-Kiu ja scias ĉu li volus, fraĉjo? Li estis pli granda sinjoro ol la diakono, kaj povas okazi ke li ne volas kompani kun la servistoj! Diris la bovisto.

-Nu kiu diablo estas al Trogulaĉo? Kio okazas kun li?

-Li iom malsaĝiĝis, diris la serioza Beljan, respirante pro drinko. Post tia rabhontaĵo, ne estas mirinde se la konŝciencan viron kaptas iu timsento. Kaj frat'-Brne estas ja konŝcienca.

-Belaĉa estas lia konŝcienco kiam li premegas homojn per interezo! Mi scias ke en ĉiuj niaj parokoj ne ekzistas proksimume pli

riĉhava viro, kiu ne ŝuldas al li, iu cent, iu eĉ ducent kaj tricent talerojn, kontraŭ dekkvar procentoj! diris Dundak.

Beljak koleriĝis.

-Tio estas vero, ni scias tion, sed kion vi diras pri Balgaĉo, pri Betulo, pri frat'-Hundo kaj multaj aliaj, kiuj pruntedonadas eĉ kontraŭ dudek procentoj? Nu, ĉu nia frat'-Brne iam ajn pagpersekutis iun, kiel ili faras? Kaj, finfine, tio ne koncernas nin, sed diru vi al mi: Ĉu frat'-Brne estas konscienca al ni? Li ne turmentas nin, kiel faradis la malsaĝa Vostvolvulo dum tiuj tagoj kiam li estis estro.

-Tio estas vera! diris ĉiuj. Dio pluvivigu Brne-n!

-Niaj animoj eksentus penon se tiu frenezulo estus restinta kiel monakejestro, daŭrigis Beljan. Li nun estus fruleviĝulo kaj formika laboremulo, fraĉjo... Oni povus ekimagi ke tio estas iu mirindaĵo, ĉar ĉiuj ni scias ke li furiozadis, ke li estis malavara, ke virinaĉoj formanĝis ĉion al li, ke li estas nun unu el la plej malriĉaj monakoj. Nu, nun li ŝajne bonanimiĝis kaj emas gajradi por la s. Frane? Li tion farus same kiel mia mortinta paĉjo! Li prezentadus fakturojn tie, kien oni sendas ilin, kaj sian saketon li monplenigus, ĉar li vidis kiel statas la maljunaĝo sen mono!

-Tion sciis ankaŭ la provinca monakejestro kaj ĉiuj aliaj, kaj tial oni ne elektis lin, diris la forĝisto. Ne timu ke li iam ajn fariĝu estro. Se Trogulo forpasos

(kion ne donu Dio), tiam lin anstataŭus ĉu Onklino, ĉu frat'-Tome el la paroko.

Tiel la servistoj interparoladis dum la vesperkunveno. Kiel videble, oni ne havis pro kio envii Strabulon. Ĝuste kiam estis interparolo pri li, la bovisto diris:

-Mi ja timas ke virkupraĉo denuncos nin!

-Kiu denuncu nin! Kriis Dundak. Ĉu la vostpenetra Strabulo, kiu estas pli timema ol iu ajn kapro, je kiu mi kraĉas, ĉar mi neniam farus kion li faras...

-Kaj kion li faras? demandis la bovisto.

-Skombro, jen kion! Kial li kuniradas Koleremulon ĉiutage transriveren?

-Dundak ekkantis saltetante:

Kviete, lerte, farmulino,

Kviete, lerte, Heleneto,

Koleremul'-animeto,

Nia pufa farmulino...

-Mutiĝu! kriis la muelisto.

-Kial "mutiĝi"? Kiun mi timu?

-Kruĉegulon! Flustris iu.

-Vi ankoraŭ mokas Todorina-n! diris Dundak, sed, je mia dipatrino kaj dipatrino filo, mi eĉ ne menciadus lin! Mi turmentadis kaj azenumadis lin malpli ol iu ajn el vi, kaj tamen timas ke mi tion multekoste pagos, kaj precipe vi! Ĉu vi pensas ke Todorina ne venĝos sin?

-Mutiĝu! Mutiĝu! Kunpetis lin ĉiuj, ĉar ĉiuj ekstremegis. Iu turniĝis, ĝuste kvazaŭ Kruĉegulo povus subite aperi malantaŭ la dorsoj. Kaj tiu ilia timo plikuraĝigis Dundak-on kiu daŭrigis:

Todorina volas venĝi sin, je mia sankta Frane, kies okulon li elfosis!... Todorina, ja, Todorina, fraĉjoj, kiun ni nomis Kruĉegulo, kiu ĉiumomente paroladis: "Kiu, ĉu mi, ĉu ne?" Ne estas mirinde ke li nin trompis, nin neklerajn, sed kiel li povis logtrompadi la monakojn! Nu, kio estas kristano... Vidu, mi neniam diras "ortodoksulaĉo", sed bele kristano, ĉar, finfine, ekzistas du pelvoj (branĉoj, - rimarko de l' tradukinto), sed unu Dio, kaj ili estas niaj fratoj!

-Tio ne estas frateca flanke de vi, komencis Boban miele (ĝuste kvazaŭ Kruĉegulo aŭskultus lin). Ni vere iom interparoladis kun li, ŝercadis, pensante ke li estas stulteca, sed malbonon ni nek deziris, nek faris al li, Dio gardu! Nek mi malamas Kruĉegulon.

La transriveruloj ne venadis en la preĝejon, sed kelkaj ofte vizitadis la monakejstran ĉelon, kaj foriradis konfuzitaj. Kiam ja iu ekaperadis, Brne sendadis ien la nevon.

Tiel forfluadis tago post tago, sen ia granda ŝanĝo. Al frat'-Brne ne reeniĝadis doloroj, kvankam liaj piedoj estis ŝveliĝintaj, kvankam li dumnokte ne povis dormadi. Foje, kiam li ordonis al la nevo deklami la cirkuleron, la knabo diris, gratante sian kapon:

-Se vi permesas, siĉjo, mi ion alian elparolos parkere.

-Tiel! Kion ja? demandis la frat' konsiderinde mirigita.

-Nu, mi scias multe da aferoj. Mi scias ankaŭ la vivon de la sankta Gregorio.

-Tiel! Ĉu la kompletan?

-La kompletan, nur se vi ne interrompos min dumparole, diris Korpulentulo, kaj, ne atendente plu, fermis la okulojn, krucigis la manojn kaj diris:

-La sankta Gregorio estis nomita kiel patriarko de la sankta preĝejo Roma, kaj antaŭ la patriarkeco, li estis monako en la monakejo de la sankta apostolo Andreo..."

Tiel li parolis kantetante, verŝajne duonhoron, respiradante nur kiam li estadis laciĝinta. Brne laŭdis lin kaj komencis serĉi ion inter siaj manuskriptoj, dum Korpulentulo plikuraĝigite elrakontis ankoraŭ kelkajn fragmentojn el la vivo, poste viceliris dudek mallongajn latinajn frazojn, kiujn li tradukis "en la nian" kaj kiuj traduke laŭtis jene: "La animo estas

senmorta korpo. Estas mortinta ŝafideto manĝas. Birdo flugas tablo estas. Ronda kaj domo...”

-Bone, bone! Interrompis lin la frat’, prezentante al li flaviĝintan papereton, kaj Korpulentulo, apenaŭ perokule trairinte ĝin, diris:

-Mi jam delonge scias tiun kanteton parkere. Ellernigis ĝin al mi la vrat’-Zakario.

-Ne elparoladu “vrat’ ”, centfoje mi diris tion al vi!... Nu, vi ne plu estas terkulturisto!... Kaj chu frat’-Zakario diris al vi kiu kreis tiun kanteton, he?

-Mi scias ke ghi estas via, kaj ke vi havas ankoraŭ multajn, el kiuj kelkajn scias ankaŭ la onklo Hokstango, sed li inversigas ilin...

-Bone, bone, ke mi aŭdu tiun, se vi ĝin jam scias!

Korpulentulo refermis la okulojn, rekrucigis la manojn kaj komencis:

“Ho Jesuo, dolĉa, ŝata,

Ne iĝu de mi separata!

Anim’ mia ne vivpluas,

Se vin ĝuste ĝi ne ĝuas!

Vi ĝoj’ estas en tristeco,

Vi sun’ estas en sombreco... –

Ekaŭskultu, vi mesistoj,

Sanktpreĝejaj defendistoj...”

-Ĉesu! Ĉu vi vidas ke vi ne scias! Tiuj du lastaj versoj, tio estas el la “Sufero de Sinjoro”. Sed ne gravas! Nun aŭskultu. Mi tralegos al vi unu mian novan kanton pri la malfeliĉa evento kiu okazis ĉe ni, kaj vi ellernos ĝin parkere! -Kaj Brne legkomencis sian plej novan kunmetaĵon, kiu enhavis kelkajn centojn da versoj, kaj kiu komenciĝis jene:

“Dio al ni direktis koleron,

Kaj al diablo lasis la liberon,

Ke ĝi eniru Kruĉegulon nome,

Kiu venis rabi monak-dome...”

Kaj ĝi finiĝis :

“Ve al vi, Todorina satana,

Se vi sentos kiel venĝas Frane!”

Tiamaniere Korpulentulo denove progresis en la onkla favoro, sed diablo erarigis lin rakonti al frat’-Onklino tiujn iliajn dumvesperajn amuzojn. Onklino ekemis fari ŝercon al Brne, kaj surskribis kelkajn latinajn versojn, kiujn Korpulentulo rapide ellernis.

-Ordonu, siĉjo, mi scias ion novan.



Tiel! Diris Trogulo sidiĝante sur la larĝan apogseĝon malantaŭ la tablo. Nu, mi aŭdu, se tio estas bela!

Korpulentulo mallevis la okulojn, levis la montrofigron, kaj komencis, skumovante ĝin:

“Si vis incolumen, si vis te reddere sanum,  
Curas tolle graves : irasci crede profanum,  
Parce mero, coenato parum: non sit tibi vanum  
Surgere post epulas: somnum fuge meridianum ...”

(Se vi bonfartemas, se vi volas iĝi sana,  
Forigu grandajn zorgojn: koleron kredu profana,  
Modere vinon, iom da manĝo: al vi vane ne estu  
Stariĝi post manĝado: tagmezan sonĝon protestu...).

(El la latina – tradukinto de la libro)

Tuj post kiam Brne aŭdis la unuajn vortojn, li faris grandajn okulojn, poste malrapide leviĝis, kaj aliris Korpulentulon, kaj tiel forte vangofrapis lin ke lia kapo turniĝis al la ŝultro.

-Azeno de azenoj! Diris la monako sufoke. Ke vi kuraĝu... ke vi aŭdacu !

-Pri kio mi kulpiĝis? demandis Korpulentulo retiriĝante. Ĉu tio estas iaj malbelaj vortoj? Tion frat'-Dume...

-Ĝuste pro tio vi pagos al mi! daŭrigis la onklo furioze kaj kaptis la kruĉon, dum Korpulentulo elsaltis en la vestiblon kaj forfuĝis dekstren por ne renkontiĝi kun Vostvolvulo, kiu, kiel kutime, estis promenanta antaŭ sia pordo kaj kiu komencis kii:

-Kien vi volas, Jerkoviĉ? Haltu! Kial vi bezonas la kuirejon ĉi-tempe?

-Mi havas labori! diris Korpulentulo ne haltante, kaj supreniris en la kuirejon.

Onklino, Koleremulo, Betulo kaj Balgo eliris el siaj ĉeloj. Vostvolvulo komencis riproĉadi Korpulentulon kaj komencis postiregi lin, sed oni haltigis lin. Poste Onklino kaj Koleremulo foriris al la monakejestro, kiun ili trovis preskaŭ senkonscian.

Ekskrementulo, kiel kutime, promenadis en la longa manĝejo, poste kaŝis la ujon kun vino kaj malfermis, kaj vidinte la palan vizaĝon, li subite retiriĝis timigite.

-Kio okazis? Ĉu io al la onklo? Ĉu li mortis?

-Por mi, li mortis! respondis Korpulentulo falsidiĝante sur la benkon. Mi ne plu povas kun li. Estus pli bone ke mi saltu en akvon.

Antaŭ ol la kuiristo eksciis la veron, venis Koleremulo kaj tuj komencis afable:

-Nu, Ive, revenu, mia knabo! Onklo estas onklo, kaj se li eĉ kririproĉis vin, tio estas por via bono!

-Belaĉa estas tiu bono, kiam li faras vangofrapojn al mi pro nenio kaj azenumas min per ĉiu dua vorto! Mi estas devigita, frat'-Jakobo, fari ion al mi. Jen kvar jarojn mi fidele servadas lin, kaj apud li penojn suferas! Pri kio mi kulpas al li? Ĉu mi kulpas ke li ne povas dormadi po tutan nokton, ke liaj piedoj estas ŝveliĝintaj. Ne, mi ne plu povas, sed iros en iun alian monakejon, kaj se ili ne akceptos min, mi serĉos oficon. Mi povas esti ĉevalstalisto, se nenio alia.

-Kia fuĝado! Kia ĉevalstalisto! Kion vi babilaĉas! diris Koleremulo, kondukante lin. Vi ne estas naskita por tio, sed por esti mesisto kaj al aliaj ordonadi... Bonan nokton, Grga! Iru ni, iru ni!

Kiam ili atingis la ŝtuparfundon, Koleremulo ŝultre kaptis lin kaj komencis flustre:

-Malsaĝa knabo! Kiel vi ne pensadas nur pri unu afero, kiel vi ne vidas ke via onklo ne longe vivos, ke vi, hodiaŭ-morgaŭ, povas plifaciligi la vivon... Ĉu vi komprenas kion mi volas diri?

-Kaj ĉu ĉio lia ne apartenas al la monakejo? demandis Korpulentulo.

-He, ĝuste vi infanecas! diris Koleremulo agrable kortuŝita, vidante ke Korpulentulo estas tamen honesta. He, ĝuste vi infanecas! ripetis li, karese frapetante lian vangon... Mi ne pensas ke vi forrabu la onklon, Dio gardu! Sed li mem enmanigos monon al vi, kiel lia sangulo, same kiel ĉiuj faradas! Ankaŭ al li estis doninta frat'-Viĉe kelkajn centojn da taleroj; amkaŭ al mi estis lasinta ion mia onklo, kaj tiel ĉiuj faradas. Ive, rekonsciiĝu! Rememoru tion: "Kiu fumon ne fumegis, tiu perfajre ne varmiĝis!" Eltenadu kaj estu obeema dum ankoraŭ kelka tempo, kaj poste estos bone al vi. Kaj nun ni iru, ĉar cetere ni multe restis.

\*\*\*\*\*

# *Niaj jubileoj*



Al miaj karaj  
**80-JARAJ NASKIĜDATFESTANTOJ**  
ĝoje mi gratulas al niaj ĉijaraj jubilantoj

**Milorad Đurđević**  
(10. 02. 1930) el Smederevo kaj

**Tereza Kapista**  
(11.04. 1930) el Beogrado

ilian respektindajn  
80-jarajn naskiĝdatrevenojn.

Ili ambaŭ grandan parton de sia vivo dediĉis por Esperanto-  
movado, serioze kaj sindoneme. Mi dankas ilin kaj samtempe tutkore mi  
deziras al ili sanon, longan vivon kaj forton por daŭrigi tiun ĉi noblan  
E-aktivecon.

Kun granda estimo

*Kristina Kujundžić el Subotica.*

Kompreneble, al gratuloj aliĝas ankaŭ nia redakcio.

*Intervjuo: Tereza Kapista*

## **KONATIĜO KUN DIVERSAJ HOMOJ KAJ LANDOJ**



*Pasintjare en mia blogo ĉe Ipernity mi aperigis intervjuon kun Tereza. En aprilo ĉi-jare Tereza fariĝis 80-jara. Okaze de tio mi aperigas intervjuon en BVS, kun kelkaj reagoj kaj sen fotoj-ilustraĵoj.*

*Tie, apud ni, multajn homojn, multajn esperantistojn ni konas. Tamen, kiom ni konas ilin? Ĉu ni scias pri iliaj esperantaj laboroj? Ili ne estas funkciuloj, ne estas politikistoj, ili estas nur niaj konatuloj, simplaj homoj pri kies aktivado en E-movado ni ne interesiĝas. Eble, ni devus, sed... Mi parolis kun mia amikino Tereza Kapista, esperantistino, Cseh-instruistino, monda vojaĝanto, tradukantino, verkistino, prelegantino, eldonisto, komitatano de UEA, emerita juristo, instruistino, aktiva esperantistino. Ŝi havus multe diri pri Esperanto. Mi provis prezenti al Vi nur parton de tio. Multaj el vi, membroj de Ipernity, ekkonis ŝin. Bonvolu, skribi pri renkontiĝoj kun ŝi. Tiam la intervjuo estos pli bona, pli plena. Ankaŭ, bonvolu, aperigi ĉi intervjuon en viaj gazetoj, se Tereza laboris en Via lando.*

### *1. Unua renkontiĝo kun E-to! Pro kio juristino lernis E-ton?*

La unua kontakto estis Tibor Sekelj kiu vivis en mia naskiĝurbo Subotica. Li diris ke li vojaĝos al Ĉinio. Mi ankaŭ ŝatus tion. Li respondis, do, lernu Esperanton. Mi tuj komencis lerni kaj poste mi organizis grupon al Ĉinio kaj forflugis el mia lando 42 esperantistoj, kiujn gvidis mi, la komencantino. Esperanto estis mia amo je unua vido, mi restis fidela al ĝi. Mi ankaŭ finis Pedagogian akademion kaj E-to altiris min de tiu pedagogia flanko.

### *2. Kiel Vi fariĝis Ĉe-instruisto? Kie? Kiam? Kial?*

Mi ĉeestis Jubilean UK en Pollando-Varsovio. Tie mi eksciis, ke post la kongreso estos seminario por Ĉe-instruistoj. Mi restis kaj finis la unuan kurson. Poste mi devis ekzameniĝi A, B, C ĝis kiam mi ekhavis la diplomon: *Cseh-metoda instruisto*. Intertempe mi jam multe vojaĝis kaj gvidis kursojn. Mi sentis ke la homoj bezonas tiuspecan kurson, ĉar tie ili tuj komencas paroli.

Karaj, mi fariĝis Esperantisto post mia emeritiĝo! Do, neniam estas malfrue komenci fari ion kun bona volo.

### *3. Promenadu tra Viaj instruistaj vojoj!*

Tio ne eblas. Mi vizitis kvin kontinentojn kaj 54 landojn kaj nur en kvin ne gvidis kursojn. Plej longe mi restis en Brazilo, kaj Novzelando, plej foraj landoj estis Ĉinio kaj Japanio, tie mi gvidis Cseh-kurson dum UK, same kiel en Roterdamo. Mi gvidis pli 120 kursojn, kaj prelegis kun lumbildoj pli ol 200-foje ie ajn en mondo.

#### *a) Eksa Jugoslavio*


Dum 8 jaroj mi gvidis kursojn en Bosnio-Sarajevo, t.n. somera lernejo. Kompreneble, mi gvidis kursojn en multegaj aliaj urboj de iama Jugoslavio.

#### *b) Hungario*

Mi trifoje estis paroliga instruisto en Fiŝkurso, tre interesa novmetoda seminario de Jozefo Horvath.

#### *c) Turkio*

Kun tri infanoj (muzikistoj-esperantistoj) el Serbio mi ĉeestis manifestacion de angla lernejo en Istambulo kie la lernantoj ankaŭ lernas E-ton. Estis ebla amikiĝo kun altnivela programo. Mi ankaŭ ĉeestis Mezoriantajn konferencojn en la jaroj 2009 kaj 2010.



#### *d) Irano*

Kursoj: En Mashad por rifuĝintaj junulinoj el Afganio. En Teherano en Kultura Centro de Esperanto.



#### *e) Burundo*

Mia plej ŝatata Internacia seminario kiun ĉeestis anoj el Kongo, Tanzanio kaj Burundo, en Buĵumbura. En Rumonge por loka junularo. Dum mia restado tie dum unu monato mi havis 168 kursanojn. Tiam estis ankaŭ fondita ANEB la nacia Burunda Esperanto-asocio. Miaj travivaĵoj estis tie la plej profundaj pro la malbona

vivnivele, sed la kursanoj estis ege diligentaj kaj karaj. La naturo bela.

#### *f) Australio*

Tio estis tradicia Somera kursaro (kie mi instruis laŭ Cseh-metodo) kun samtempa Australia E-kongreso.

#### *g) Novzelando*

Eta kurso antaŭ Novzelanda Kongreso kaj paroligaj ekzercoj dum la kongreso. Eta kurso post la kongreso. Tamen mi tie restis dum tri monatoj kaj travojaĝis ambaŭ insulojn, dank' al instruistino Jo Horton kiu prizorgis min. La gejiroj estas mirindaj!

#### *4. Viaj esperantaj konatuloj (nur kelkaj)?*

Mi neniam elektus ke la aliaj ne sentu sin ofenditaj. Estas multaj. Mi ekkonis multajn organizaĵojn pri kiuj mi frue neniam aŭdis: Mondcivitanojn, SAT-anojn, Legion de Bona volo, Spiritistojn, Kvakerojn, ateistojn...

Mi vizitis grandajn kaj etajn Esperanto-bibliotekojn, Esperanto-centrojn, muzeojn, ekspoziciojn, seminariojn sennombrajn prelegojn de konataj Esperantistoj, agadprogramojn, diversajn aranĝojn. Mi estis ĉeforganizanto de SAT-kongreso en Beogrado.

#### *5. Libroj tradukitaj (e-s aŭ s-e)*

Aperis mia traduko al Esperanto de Tibor Sekelj *Temuĝin la filo de stepo*, kaj en serba de Masayuki Saionjhi "Speciala Orienta Diina masaĝo, libro de Bruno Vogelmann "Nova Realismo", de Martin Kojc "La lernolibro de la vivo", "Centa simio", la libro de Branimir Ŝĉepanović *Buŝo plena je tero* kiun tradukis Antonio Sekelj kaj mi nur aldonis. Mi verkis multajn tekstojn por E-gazetoj.

#### *6. Libroj originalaj*

*Esperanto-Lingvo de Paco en Irano kaj Esperanto-Lingvo de Paco en Burundo*. Tiuj du jam aperis, kaj nun mi preparas: *le tie, kun iu, en la Mondo*. Tio estos libro pri travivaĵoj kaj ĝin mi nun verketas.

### *7. Kion Vi nuntempe faras?*

Nuntempe mi kompilas KD pri "Virinoj en la Mondo" okaze de la Internacia virina tago, kaj ordigas miajn travivaĵojn en Suda Afriko, kie mi ne instruis ĉar tie mi ne havis kondiĉojn fari tion.

### *8. Venontjare estos Via jubileo. Ĉu vi estas kontenta pri ĝisnuna laboro (kaj sukceso)?*

Kial vi malkovras tion? Jes venontjare mi estos 80-jara. Do, mi komencis tro malfrue, tamen dum 25 jaroj mi faris sufiĉe (laŭ mia forto kaj kapablo) kaj mi estas kontenta, konsciante ke ĉiam oni povus fari iom pli. Mi instruis milojn da kursanoj, espereble kelkaj restis bonaj Esperantistoj.

### *9. Rakontu neordinaran travivaĵon el Esperanta laboro!*

Tio estis kiam Tibor Sekelj devis vojaĝi al Sofio-Bulgario por ĉeesti UNESKO-kunsidon por akiri Rezolucion pri Esperanto. Li petis mian akompanion ĉar li havis novan aŭton kaj ne ŝatis veturi sola. Post 200 kilometroj ni konstatis ke li forgesis kaj la pasporton kaj la monon hejme. Do, ni devis revojaĝi. Poste ni perdis la kunligon kun homoj kiuj atendis nin, duontagon pli frue. Ni tute ne sciis kien ni iru. Post noktomezo ni atingis la bulgaran limon, kie la doganistoj ĉion elprenis el la aŭto kaj faris ege malagrablan traserĉon. Ni estis suspektindaj!!! Pro malfruo kaj ĉio, ni estis ege nervozaj. Feliĉe, Tibor planis ripozi antaŭ la kunsido. Pro tio ni ekis unu tagon pli frue. Do, tamen li ne malfruis sed estis ege laca. La Rezolucio de UNESKO estis akceptita!

La plej neordinara estas, ke al ĉiu lando mi devis havi vizon, kio kostas, ne nur monon sed torturon, dumnoktan vicstaron antaŭ ambasadejoj, konzulejoj ktp. Mi havas plenajn ses pasportojn.

El Singapuro mi vojaĝis al Malezio, kaj ĉe la dogano la ĉina amiko trairis sed mi estis haltigita. En la demandlisto estis demando de kie mi venis – mia lando. Tiam ni estis Serbio kaj Montenegro. Tion mi skribis en la liston. Poste montriĝis ke mia pasporto portas landnomon Jugoslavio, kiu jam 10 jarojn ne ekzistis, sed tio restis neŝanĝita. Kiam ili kontrolis laŭ sia listo de landoj ili diris ke tiu lando ne ekzistas. Tiam mi rimarkis ke ili serĉas tiel kiel estis skribite sur pasporto JUGOSLAVIO kaj ne trovis, ĉar sur ilia listo estis Jugoslavio. Tiam mi vere sentis min perdita, pro unu litero! Fine ĉio estis en ordo...

*10. Diru propran opinion pri Esperanto (sen konataj ofte ripetataj vortoj)*

lom ŝerce: Ĝis kiam ni ne elpensos ion Mcdonalds-on aŭ Coca Cola-on ni restos senmonaj. Sen mono estas malfacile sukcesi! Tamen ĝi estas mia ŝatata lingvo ĉar nur E-to ebligis al mi renkontiĝi kun miloj da homoj el ĉiu anguloj de la mondo, ne nur renkontiĝi sed amikiĝi kaj resti dum longaj jaroj geamikoj. Mi vere ekkonis, kiel la homoj vivas, konstatis ke la diverseco estas tio, kio plaĉis al mi. Sed en la koroj loĝas la samaj sentoj!

*11. Via plej ŝatata esperanta libro*

Eble mi nomu miajn ŝatatajn verkistojn: Julio Baghy, Istvan Nemere, Tibor Sekelj, Trevor Steel, Mikaelo Bronstein, Spomenka Ŝtimec...

*12. La plej bela Esperanta kongreso, renkontiĝo...*

UK en Kubo, UK en Pekino, UK Japanio... Vere, ĉiuj UK estis travivaĵoj. Interesa estis iu festo en Legio de Bona volo, en Rio-de-Janeiro, eble tio estis jara renkontiĝo. Mi estis sola el Eŭropo kaj salutis la renkontiĝon en Esperanto.

*13. Kio estas malbona en E-movado?*

Niaj kongresoj estas fermitaj, la ekstera publiko ne povas alveni al niaj programoj, ne povas konatiĝi kun ni, niaj ideoj. Ni maljuniĝas kaj mankas novaj junaj, entuziasmaj homoj, ni ne malkovris kiel altiri ilin.

Min nur konsolas tio, ke nun pere de reto ni havas novajn junajn homojn kiuj lernas kaj interesiĝas, sed ili *ne aliĝas* al la movado, eĉ ne al lokaj grupoj. Mi ne scias kiel solvi tion. Eble nova organiza formo, komputila reto aŭ io alia... Laŭ mi la reto ne estas movado!

*14. Diru ion pri kio mi ne demandis Vin!*

Vi ne demandis pri Brazilo. Mirinda lando. Mi traflugis pere de iu speciala bileto 30.000 km, de hejmo, tra Brazilo kaj reen. Mi vizitis Amazonion, kaj 29 urbojn. La surpriza afero estis, ke ĉie laŭ konsento kaj plano esperantistoj atendis min kaj transdonadis min kiel stafetbastonon de urbo al urbo. Tie mi gvidis kursojn en multaj lokoj kaj la plej amasa estis tiu ĉe *Legio de bona volo* en Sao Paolo. Tio estas respektinda organizaĵo (eble mi diru speciala kristana religio). Ili laboras kiel entrepreno ĉar ili



havas propran terkulturadon, kie ili produktas verdaĵojn por la kuirejoj kaj ili nutras la senhejmulojn, ili havas maljunulejon, infanĝardenojn, elementan kaj mezan lernejojn, grandan aron da tradukistoj, organizantojn, eldonejon, plurajn modernajn preĝejojn, kiuj havas ankaŭ aliajn ejojn por renkontiĝoj, prelegoj ktp. Vere multaj homoj laboras bonvole, senpage kaj la rezulto estas videbla. Tiu movado disvastiĝas, bonfaras, havas respektindan organizan formon kaj uzas tiucele ankaŭ Esperanton. Unu el la celoj estas la edukado kiu sufiĉe mankas en Brazilo

Mi tradukis kvin teatraĵojn kiuj estis prezentitaj dum kvin UK-oj. La ĉefrolanto ĉiam estis Saŝa Pilipoviĉ.

Fine mi dankas al ĉiuj kiuj invitis, gastigis min kaj akceptis mian instruadon. Ili ebligis al mi la plej belajn travivaĵojn.

### **REAGOJ:**

Mondcivitano:

Jes, Tereza estas vere mondcivitanino. Ŝi estas nia esperanta perlo, kiel diris iu samideanino el Hungario.

### **César Dorneles diras:**

Gralulon al Dimitrije kaj al Tereza por bela intervjuo. Mi samkonsentas pri la 'fermeco' de niaj UK. Devus ekzisti speciala programo en la lingvo de la lando por neesperantistoj (kaj komencantoj) inkluzive kun artaj prezentaĵoj ĝuste, por ke la homoj sentu la vivecon de E-o. Mi metos ligilon en mia lasta blogaĵo al la intervjuo.

### **Stelo diras:**

Nia unua renkontiĝo okazis en Pollando 1988 en Bidgosch.... kun amo mi memoras tiujn tagojn kaj ĉiam kun granda ĝojo denove renkontas Tereza'n. Malofte vi povas renkonti tiel bonan esperantistinon, gratulojn al ŝi. Kun veraj amikaj bondeziroj, Stelo

### **Sulko diras:**

Mi estas iu el multaj personoj kiuj kunlaboras en iuj agoj de Tereza kaj ni, de tempo al tempo, interŝanĝas ideojn, informojn kaj impresojn.

**Tilio diras:**

Mi atestimas personon kaj verkon de Tereza. Krome, mi konsideras ŝin bona amikino, malgraŭ aĝodiferenco inter ni. Fakte tiu diferenco ne estas sentebla, dum ŝi parolas.

Antaŭ ol vive renkontiĝi kun Tereza, okaze de SAT kongreso en BG 2006, ni interŝanĝis kelkajn retmesaĝojn, kaj mi imagis ŝin samaĝa kiel mi. Poste mi estis iomete surprizita, vidinte pli maturan personon.

Ĉiujn beondezirojn al vi ambaŭ - Tereza & Diso - de via amikino Tilio.

**Wâner diras:**

Mi memoris kaj kompreneble partoprenis belegan prelegon de d-rino TEREZA KAPISTA farita en nia E-Klubo, kiam ŝi vizitis mian urbon Ubá, ŝtato Minas Gerais, Brazilo. Vere ŝi estas tre simpatia samideanino kaj ŝi restis ĉe ni dume unu semajno. Ĉu ŝi iam revenos?

**Maria Da Silva diras:**

Emocie mi legis viajn ĝentilajn vortojn pri via vizito al Brazilo kaj Legio de Bona Volo (LBV). Mi estis via lernantino dum tiu periodo, kiam vi gvidis kurson en LBV. Do vi estis mia unua E-instruistino. Mi, kiel LBV-anino, deziras denove revidi Vin ĉe ni en Legio de Bona Volo. Koran dankon!

Dimitrije Janičić



## KVINDEK ESPERANTISTAJ JAROJ

Estas preskaŭ nekredeble, kiel la tempo rapide pasis.

Ĉi-jare mi festas kvindek jarojn de kiam mi komencis lerni Esperanton. La 24-an de aprilo en la jaro 1960 mi finis la ekzamenon „A“. Kun bonega sukceso, estas skribite en mia diplomo. En la komisiono estis Gvozden Sredić, Stevan Đalinac kaj Nedeljka Subotić. Direktorino de la Esperanto-instituto tiam estis Vesna Skaljer Race.

Dum pasintaj jaroj mi ricevis distingon: medalon de „Vilho Setala“ en Finnlando en la jaro 1980. Mi ankaŭ ricevis distingon por meritoj pro tre aktiva meritplena kaj sinoferta laboro en E-movado la 27-an de novembro 1983 en Ŝkofja Loka. Mi, ankaŭ, ricevis E-insignon okaze de dudekkvin jaroj de mia laboro en Esperanto-movado.

Dank' al Esperanto mi travojaĝis multajn landojn kaj ekkonis multajn homojn. Esperanto riĉigis mian vivon.

Dušan Tufegĝić



# Jubileoj

Okaze de la 8-a de Marto 2010 „Tago de la laboranta virino“

## Ksenija Atanasijević



La Oka de marto estas proklamita „Tago de la laboranta virino“, laŭ la persona iniciativo de Klara Cetkin (Klara Zetkin, 1857-1933), elstara batalantino en la germana kaj internacia laboristaj movadoj, en kiuj ŝi speciale agis por organizado de virinoj. Ŝi estis sekretariino de la Internacia virina sekretariejo ekde 1907, kunlaboris kun Engels kaj Lenino, estinta tre aktiva en la Dua Internaciano (1889-1939). Dum la Internacia konferenco de virinoj en Kopenhago la Oka de marto estis oficiale proklamita. De tiam ĉiun jaron la progresema homaro festas tiun tagon. Ankaŭ la Unuiĝintaj Nacioj akceptis tiun tagon por monda

festotago!

La Oka de marto estis tre solene festita en nia lando post la Dua mondmilito. En la pasinteco de Serbio kaj Jugoslavio estis multaj elstaraj eminentaj virinoj en diversaj medioj de scienco, kulturo, arto, sanigado, milito ktp., kiuj estis samtempulinoj de Klara Cetkin. Ili ankaŭ vivis, laboris kaj fariĝis konataj kaj famaj en la dua duono de la 19-a jarcento kaj en la unua duono de la 20-a. Mi listigos nur kelkajn plej gravajn virinojn en Serbio: **Jovanka Stojković** (1852-1892), la unua serba pianistino; **Draga Ljočić** (1855-1926), la unua virino kuracistino en serbio; **Nadežda Petrović** (1873-1915), fondintino de la serba moderna pentroarto, pentristino kaj militantino; **Mileva Ajnštajn** (1875-1948) unu el la unuaj virinoj teoristinoj de fiziko en la mondo, edzino de la fama Alberto Ajnštajn; **Isidora Sekulić** (1877-1958), laŭ multaj opinioj, la plej instruita, klerigita kaj la plej prudenta serbiino en sia tempo, verkistino, tradukistino kaj brila interpretistino de la belartaj verkaĵoj; **Jelisaveta Načić** (1878-1955), la unua virino diplomita arkitektino en Serbio kaj la Ĉefa arkitekto en Beogrado; **Živana (Žanka) Stokić** (1881-1947), la plej granda serba aktorino, kiel diris Mira Stupica; **Marija (Maga) Magazinović** (1882-1968), la fondintino de moderna dancado en Serbio, la unua ĵurnalistino en la ĵurnalo „Politika“; **Milunka Savić** (1888-1973), heroino en la Unua mondmilito, rotestrino de la Serba armeo, la unika virino en la mondo distingita per la franca ordeno „Milita Kruco kun Ora Palmo“, portantino de „Karaĝorĝa Stelo kun Spadoj“ kaj „Ordeno de la Honora Legio“; **Anica Savić Rebac** (1892-1953), verkistino, historiistino de filozofio, bonega helenistino, profesorino de Beograda Universitato; **Ksenija Atanasijević** (1894-1981), la unua docento kaj la unua virino kiu doktoriĝis en Beograda Universitato; **Desanka Maksimović** (1898-

1993), poetino kaj akademiano, profesorino de literaturo; **Milena Pavlović Barili** (1909-1945), la plej signifoplena pentristino inter du mondaj militoj; **Ljubica Marić** (1909-2003), unu el la plej grandaj artistoj en la serba historio, komponistino, direktantino, verkistino, pentristino kaj skulptistino.

Ĉiuj supre menciitaj grandulinoj estis ne nur bonegaj kaj perfektaj personoj sed ili samtempe havas sian gravan rolon en emancipado de virinoj en nia relative postrestinta socia, politika kaj kultura medioj. Inter ili, Ksenija Atanasijević, havis eble la plej akrajn batalojn kontraŭ superstiĉoj kaj por egalrajtoj de virinoj. Pro tio ni dediĉas ĉi tiujn liniojn al la virino kies batalo tiusence estas memorinda.

Ksenija Atanasijević naskiĝis la 5-an de februaro 1894 en Beogrado. Post fin-lernado de gimnazio ŝi studis filozofion kaj klasikajn lingvojn en Beogrado (1913-14 kaj 1919-20). Sian studojn ŝi daŭrigis en Ĝenevo kaj Parizo (1920-21).

En Beograda universitato Ksenija aŭskultis prelegojn ĉe la famaj profesoroj: d-ro Branislav Petronijević, monde konata filozofo kaj grandega aŭtoritato en filozofia vivo, d-ro Milutin Milanković, unu el niaj la plej grandaj sciencistoj, d-ro Veselin Čajkanović, ktp. Ili ĉiuj estis ravitaj pri ŝiaj intelektaj eblecoj, fervoro kaj scio. Ksenija diplomiĝis en junio 1920 nur kun bonegaj notoj kaj laŭdoj. En sia intima taglibro ŝi enskribis: „Ŝajnas ke mi estos elektita por asistantino de Brana, pro miaj bonegaj notoj“, sed ankaŭ: „Brana ne permesas originalecon, kaj li dezirus, ke mi pensu tute kiel li“. Sed la beograda publika opinio profanas ŝian sukceson – disvastiĝis intrigoj pri sentimentala ligo inter profesoro kaj studentino. Ksenija estis ofendita.

## БРУНОВО УЧЕЊЕ О НАЈМАЊЕМ

ТЕЗА  
КСЕНИЈЕ АТАНАСИЈЕВИЋЕВЕ

ПРЕМАЊНА ЗА ДОКТОРСКИ ИСПИТ НА СЕДИНИЦИ  
ФИЛОЗОФСКОГ ФАКУЛТЕТА  
УНИВЕРЗИТЕТА У БЕОГРАДУ  
ОД 16. ЈАНУАРА 1922. ГОДИНЕ  
ПРЕМА РЕФЕРАТУ ЧЛАНОВА ИСПИТНОГ ОДБОРА  
ГГ. Др. БРАНИСЛАВА ПЕТРОНИЈЕВИЋА,  
РЕД. ПРОФ. УНИВЕРЗИТЕТА  
Др. НИКОЛЕ ПОПОВИЋА,  
ДОЦЕНТА УНИВЕРЗИТЕТА.



У БЕОГРАДУ  
ШТАМПАРИЈА "БРЕМЕ", БАЛКАНСКА 5.  
1922.

En sia dudekoka vivjaro Ksenija Atanasijević ekestis la unua virino akirinta en Beograda Universitato la akademian titolon de doktoro de scienco. La disertacion *Doktrino de Braun pri la plej malgranda* ŝi brilante defendis en Januaro 1922, sed kelkaj membroj de la ekzamenkomisiono „sprite“ komentariis: „Ĉu vi kredas, kara kolego, ke estas ĉio en ordo kun la hormonoj de ĉi tiu juna damo?“ Branislav Petronijević intencis proponi Ksenija-n por docentino. Tiam en la Regno de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj nia akademia medio estis perfekte genre homogena, t.e. maskulina. Ekzistis neniu universitata instruistino. Profesoro Milan Trivunac kontraŭis per la vortoj: “Estas regionoj en Serbio kie virinoj kisas manojn de pli junaj viroj, kaj vi deziras ke ni donu docentan katedron al iu juna fraŭlino“. Sed, ho ve, anstataŭ en Universitaton, ŝi estis direktita labori en gimnaziojn de Beogrado kaj Niŝ. Ŝi instruadis en gimnazio de 1921 ĝis 1924.

Tamen en januaro de 1924 Ksenija Atanasijević komencis instrui en la Filozofia fakultato de Beograda universitato. Juna, moderna, sendependa virino enportis spiriton de novaĵoj. Ŝi estas paradigmo por

junaj homoj, kiuj, dum dudekaj jaroj de la pasinta jarcento, sopire serĉis siajn identecojn.

Tiutempe profesoroj ne povis leviĝi super balkanan postrestecon kaj akcepti virinon, krom tio filozofinon, kiel egalrajtan. Estas multaj pruvoj ke ŝiaj kolegoj faris ĉiujn eblajn malfacilaĵojn, preskaŭ de la unua tago de ŝia alveno inter ilin, kaj ke ili plej fervore agadis, ne nur mortigi la volon por laboro, sed ankaŭ por la vivo. Nur iu kun tiel forta talento, kia estis ĉe fraŭlino Atanasijević, povis elteni kaj afirmiĝi, spite al ĉiuj baroj, kaptiloj, spionadoj kaj intrigadoj, kiuj senĉese estis metaditaj sur ŝian vojon. Al la kolegio de la Filozofia fakultato ne plaĉis ke nia filozofiino volis eniri en neniun klikon kaj ne akceptis esti ombro aŭ servistino de iu ajn pli aĝa profesoro. Ŝi estis tro individua kaj kreative dotita, por povi antaŭeniri en tia neproduktiva kaj sterila medio.

La plej energia kontraŭulo de la elekto de Ksenija por docento estis Nikola Popović, kolego ĉe katedro, kiu per diversaj rimedoj kalumniis la koleginon, eĉ dum siaj regulaj instruhoroj. Li forigis la asistanton Bogdan-on Pešić, ĉar li aŭskultadis prelegojn de „tiu fraŭlino“. Jam en 1924 Ksenija kritikis kelkajn verkojn de Popović, al kiu tiam helpis Brana Petronijević, per sia aŭtoritateco.

Multaj intrigoj sekvis la bravan filozofiinon. Eĉ akademiano Miloje Vasić, profesoro, doktoro pri arkeologio akuzis ŝin pro plagiato en tri popularaj prelegoj, sed ne en 215 verkaĵoj ĝis tiam publikigitaj! La ĉefa inspiranto estis fama profesoro Petronijević, kies venĝecon ŝi provokis, ĉar ŝi ne plenumis lian esperon ke ŝi fariĝos lia „ombro kaj servistino“.

Post ok jaroj de kampanjo por ŝia forigo el la fakultato la Konsilantaro de la fakultato, dum iu nokta kunsido, ne reelektis ŝin la 24an de oktobro 1935 por docento. En 1936 Ksenija demisias ĉar, kiel ŝi diris, al ŝi mankis fizika kaj spirita fortoj esti ĉe la katedro kun du spadoj en ĉiu mano. Tiel ŝi fariĝis viktimo de la patriarkaj superstiĉoj pri virino kaj sovaĝeco direktita al virino flanke de la reprezentantoj de „senlimaj“ viraj prudentoj. De tiam Ksenija laboris kiel instrua inspektoro en la Ministrejo pri klerigo ĝis 1941.

Pro ŝiaj prelegoj kaj verkaĵoj kontraŭ antisemitismo kaj naziismo la okupantoj arestis ŝin en 1942, kaj post la milito ŝi esti bibliotekistino de la Nacia biblioteko en Beogrado. En tiu posteno ŝi pensiigis en 1946.

Laŭ Enciklopedio de Jugoslavio la filozofiaj konceptoj de Ksenija Atanasijević estis formitaj sub influo de *empirioracionalismo* de Branislav Petronijević, kaj ŝia laboro en multaj artikoloj, libroj, magazinoj kaj periodaĵoj reflektas tipan eklektismon, sed en *Filozofiaj fragmentoj* ŝi estas pli libera. En pli malfrua periodo de ŝia laboro superregas mistika kaj religia malracionalismo.

d-ro Pribislav Marinković

(Literaturo: Enciklopedio de Jugoslavio (Zagreb0, MCMLV, kaj. 1)

Љиљана Вучетић: *Честитам вам, госпођице, ушли сте у пакао!*, („Политика, 6a de marto 2010)

Прибислав Маринковић: *За памћење...*(Beogrado, 2006).

# Novaj libroj

Prezento de nova libro

## PRI KIO SONĜAS FLOROJ



En beograda Studenta kulturcentro hieraŭ vespere (17. 02. 2010) estis organizita prezentado de poezilibro „Pri kio sonĝas floroj“ (О чему сања цвеће), de serba poeto de la pli juna generacio Milovan Stankoviĉ.

Tio estas por serbaj kondiĉoj neordinara libro kaj same estis neordinara prezentado: 69 poemojn (atentu la signifon de ĉi tiu numero) esperantigis konata serba esperantisto Zlatoje Martinov kaj la libro aperis dulingve (serbe kaj esperante). Bedaŭrinde, en plena salono de beograda Studenta kultura centro multnombraj ĉeestintoj nenion sciis pri internacia lingvo Esperanto.

Prezentantoj de la libro parolis pri tio kaj promesis ke aparte estos organizita prezentado de libro por esperantistoj.

La libron eldonis tre konata eldonisto „Prometej“ el urbo Novi Sad kaj tio estis la unua libro en Esperanto kiu aperis en ordinara eldona programo.

Ni esperas ke tio ne restos unika fenomeno.


Dimitrije Janičić



Novaj libroj

## AVENTUROJ DE OKJARULO

(Ĝuro Majstoroviĉ: **UMBAJA NES – PIEDE TRA ŜUMADIO**, eldonis Fervojista Esperanto Societo „Branko Maksimoviĉ“, Beogrado, 2009, 86 paĝoj, ISBN 978-86-913381-0-7)



Ĝuro Majstoroviĉ, esperantisto, pedagogo kaj patro de niaj plej junaj esperantistoj verkis antaŭ dekdu jaroj – libron pri lia ekskurso tra Ŝumadio kune kun sia okjara filo Umbaja. Tereza Kapista esperantigis la libron, lingve ĝin kontrolis Vinko Markovo el Parizo. Tiamaniere antaŭ ni aperis iaspeca konfeso de la okjara Umbaja kiu somere, antaŭ dekdu jaroj faris aventuron validan de atento, faris belegan promenadon tra Ŝumadio. Ŝumadio estas centra parto de Serbio, la plej bela, verda parto de lia patrujo.

La enhavo de libro estas neordinara rakonto pri ordinaraj aferoj. Aventuro iri piede nun, en tempo de aŭtomobiloj, aŭtobusoj, trajnoj, bicikloj... Ekkoni naskiĝlandon per gamboj, kune kun patro pro sekureco. Ĉi tiu libro estas rakonto pri renkontiĝoj kun nekonataj homoj, rakonto pri harmonio kun naturo, pri gastamaj vilaĝanoj de Ŝumadio, pri dormado sub somera ĉielo, pri kolektado de fruktoj, pri preparo de tagmanĝo, pri edukado, pri gepatra amo... Finfine, kiel vera dolĉaĵo – fantasta laŭdo de heroeco de Umbaja, kiu komencis ekkoni sian patrolandon kaj deziris travivi aventuron.

Umbaja nuntempe estas studento de muzika konservatorio en Parizo. Li komencis studadi en Parizo dank' al esperantistoj. Nun li estas aktiva esperantisto, membro de SAT.

Kun rideto li pasintmonate parolis pri tagoj de sia granda aventuro, pri sia patro, organizinto de la aventuro kaj fotisto de ilia vojaĝo. Li estas plenkreskulo, vidis sufiĉe de la granda mondo, konkeris multajn internaciajn premiojn por muziko – rapide li finos la studadon... Tamen, li rememoras sian infanan aventuron kiel la plej belan travivaĵon el sia vivo.

La libro, siamaniere, havas apartan historion. Ĝi estis verkita tuj post reveno de la kvintaga ekskurso, sed oni ne povis trovi eldoniston, ĉar la libro enhavas multajn kolorajn fotojn kaj la elspezoj de presado estis grandaj. Fine de la pasinta jaro FES „Branko Maksimoviĉ“ decidis



presi modestan eldonkvanton, ĉar familianoj Majstoroviĉ estas ĝiaj membroj.

Modesta libro, tutkolora, nur 86 paĝoj, sed libro estas vera refreŝigado. Frukto de iu edukada koncepto, stimulo por ŝatantoj de naturo, libro sen grandaj pretendoj, verkita simple, vere, dokumente, kiel ilustrita taglibro.

Fine de la libro estas poemo. Kantema, ekologema poemo pri naturo. Umbaja diris ke li intencas komponi muzikon por tiu teksto, kiun bele esperantigis forpasinta Marko Petroviĉ. Poste lia familia muzika grupo faros CD-on kaj ĉiuj esperantistoj povos aŭskulti kaj kanti ĝin.

La libro estas bele preparita, ĝia enhavo estas simpla, sed tre legebla, ĝiaj mesaĝoj aktualaj, sendube bela libro, senkonsidere ke ĝi parolas pri Ŝumadio, ĝia enhavo trairas limojn de la regiono, ĝiaj mesaĝoj estas universalaj por gepatroj, por ekologoj, pedagogoj, por infanoj, ĉar, eble, ĝi estas unue infana libro.

Dimitrije Janičić



## Renkontiĝoj: **NEORDINARA ORDINARA HOMO**




Pasintsemajne (la 27an de marto) mi vojaĝis en urbon Niŝ kaj renkontiĝis kun interesa homo. Li nomiĝas Staniŝa Stanković, kvankam ĉiuj nomas lin nur Maki.

Staniŝa estas profesie arkitekto, sed neprofesie mondvojaĝanto, pentristo, hajko-poeto, libervolulo, bonvivanto, kantisto...

Li aparte ŝatas hajko poezion. Kiam li laboris en Japanio li estis honorita per la Unua premio en konkurso „Hajku International Association Tokyo“. Lia unua libro hajko poezio estis *Sunce izlazi (Suno eliras)*. Pasintjare aperis libro *Reka teĉe (Rivero fluas)*. La libro enhavas hajko-versojn kiuj estas el serba tradukitaj en la anglan, rusan, francan, germanan, grekan, svedan, turkan, bulgaran, hungaran, slovakon, ĉeĥan, rumanan, slovenan, makedonan, araban, hebrean, italan kaj Esperanton.

Liajn versojn esperantigis konata Niŝa esperantisto Jovan Jankoviĉ Ĵan, por kiu aŭtoro kaj membroj de Niŝa fervojista Esperanto-societo preparis en Niŝa Maljunulejo, kie nun loĝas s-ro Ĵan, esperantan aranĝon por ĉiuj kaj prezentis tiun neordinaran libron.

Jen kelkaj hajko-versoj el la libro:



\*

Rivero fluas  
ombro de ponto  
ne rompiĝas.

\*

La unua ploro  
je la okuloj de patrino  
la tuta mondo.

\*

En la parko  
nur fontano  
per la akvo disflorita.

\*

Malantaŭ de la suno  
la floro denove  
malfermis sin.

Staniša, de kiu mi ricevis la neordinaran libron de hajko-poezio, dudeklingvan, estas ordinara homo. Aŭ, eble, iom neordinara. Li laboris kiel arkitekto en multaj landoj de la mondo (Japanio, Ĉinio, Tajlando, Senegalo, Germanio, Brazilo, Hindujo ktp.), liaj hajko-versoj estis aperigitaj en hajko-antologioj de multaj landoj, li estis prezidanto de Societo de serbjapana amikeco kaj, kompreneble, mondvojaĝanto.

\*

Paŝo post paŝo  
li alvenos  
ĝis horizonto.

Ĉu ne? Feliĉan vojaĝon. Ĝis horizonto!

D. Janičić



Mi tralegis

## TEMPON HAVIGI KAJ HALTIGI



Malgranda libreto de poemetoj el la plumo de la ĉeĥa Zdenka Bergrova, lukse ornamita kaj tre sukcese ilustrita, en la traduko de Jaroslav Krolupper, meritas atenton de homoj, por kiuj poezio estas ŝatokupo.

Ne estas facile interplekti en rimoj la tutan riĉecon de la vivo, ĉiujn detalojn de nia ĉiutageco, interplekti tiom kurte kaj ŝpareme vortojn. Tamen, ĉio influas tiel bildece, persvade al legado de la poemoj. Kiam oni ĝuas tiel libron, tiam la leganto sentas ke ĉiu vorto estas en la vera loko, ĉiu verso estas travivita, ĉiu palpebrumo de sunleviĝo, tago, nokto, lunlumo, guto de roso sur la floro, lotusoj en la lago, ekstremo dum renkontiĝo kun amato, kanto de blankaj nubŝafaroj, vibrado de voĉo en kanto meritas version: *diru, la memorarkivo, kion aprezi, kion priplori je gloro de vivo* – tiel sin esprimas la poetino. Ĉio ĉi, en perle pura poemeto, estas gloro de tiu vivo, kvankam la vivo estas efemera vojaĝado, kvankam la morto ĉion forviŝas.

Ŝiaj amaj sentoj estas tre simplaj kaj klaraj: *kiam vi estas ĉi tie, karulo / floris en domo ĉiu angulo*. La tradukinto asertas ke la forpasinta aŭtorino sukcesis *kapti la misterecon kaj subtilecon de ĉina poezio*. Pro tio, li tradukis elektitajn poemojn kaj donis ilin al ni en libro plena je animo kaj subtileco por ke *larĝa internacia publiko povu konatiĝi kun la versoj*. Ŝi ĉiam havas belan version. Eĉ kiam nokto fluas en vino kaj kiam iuj jam dormas – restas ŝiaj inspiritaj versoj pri mallumo, ĉielo, steloj, nokta venteto...

Al ŝi ne sufiĉas esti *riĉa kaj feliĉa*, sed, tamen, ŝi sukcesis haltigi la tempon. En momentoj, kiam ŝi vidis arĝentan ĉielon, okulojn kiel fontojn, kiam sentis solecon pitoreske, kiam rivero estis saĝo, kiam nuda suno briligas surfacon de verda lago, kiam feoj kantas, kiam sovaĝaj geranioj sonĝas, kiam akvo ruĝe scintilas, ŝi tion fiksis en versoj memorotaj. Ŝi scias ke *poezio, glora kiel luno, / eterne vivas kiel suno*.

Zdenka Bergrova, kiel ĉiuj ni, ne sukcesis haltigi la tempon. Ŝi foriris al la eterneco, sed ŝi al ni donacis belajn versojn pri tiuj banalaj, ordinaraĵoj okazaĵoj. Danke al tiuj versoj ŝi restis kun ĉiu homo ŝatanta la belecon. Por eterne kaj rememoro. Olduloj diras ke mortintoj vivas tiom longe kiom oni rememoras ilin. Ŝi restas viva tra siaj belaj versoj. (D. J.)

(Aperis en LF, 242/2009)

# Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

Већ смо научили да *tiu ĉi* или *ĉi tiu* значи овај, а, о.

При грађењу неких израза узимамо само речцу *ĉi*.

<i>ĉi tiu jaro</i>	-ова година	<i>ĉi tiu vespero</i>	-ово вече
<i>ĉi-jare</i>	-ове године	<i>ĉi-vespere</i>	-вечерас
<i>ĉi-jara</i>	-овогодишњи	<i>ĉi-vespera</i>	-вечерашњи
<i>kune</i>	-заједно	<i>ĉi-kune</i>	-у прилогу (заједно)

*Ĉi-kune* ni sendas al vi kopion de nia antaŭa letero.

У прилогу ти (или вам) шаљемо копију нашег претходног писма.

*Ĉi-vespera* televid-programo estas tre bona.

Вечерашњи телевизијски програм је веома добар.

∴

**Поређење придева**

Савладали смо до сада поређење прилога. Исте речце се користе и за поређење придева.

<i>rapida</i>	-брз, а, о
<i>pli rapida (ol)</i>	-бржи, а, е (од, него)
<i>plej rapida (el)</i>	-најбржи, а, е (од)
<i>malpli rapida (ol)</i>	-спорији, а, е (од, него)(мање брз)
<i>malplej rapida (el)</i>	-најспорији, а, е (од)(најмање брз)
<i>malrapida</i>	-лаган, спор
<i>pli malrapida (ol)</i>	-лаганији, а, е (од, него)
<i>plej malrapida (el)</i>	-најлаганији, а, е (од)

Уз суперлатив придева (*plej*, *malplej*) се употребљава одређени члан (la).

∴

Као суфикс *-iĝi* значи: уз или именичне корене – постати онаквим или оним што је у корену речи.

<i>seka</i>	-сув, а, о	<i>laca</i>	-уморан, а, о
<i>sekiĝi</i>	-осушити се (постати сув, а, о)	<i>laciĝi</i>	-уморити се (постати уморан, а, о)

pli bela	-лепши, а, е	edzo	-муж, супруг
plibeliĝi	-пролепшати се (постати лепши, а, е)	edziĝi	-ожени се (постати супруг)
fianĉino	-вереница	esperantisto	-есперантиста
fianĉiniĝi	-верити се (постати вереница)	esperantistiĝi	-постати есперантиста

Уз глаголске корене – доћи у стање које је у корену речи.

sidi	-седети	levi	-дићи
sidiĝi	-сести	leviĝi	-устати
fari	-чинити, правити, вршити	naski	-родити
fariĝi	-постати	naskiĝi	-родити се

iĝi значи постати (некаквим).

Радња глагола са овим суфиксом је аутоматска, сама од себе. Ови глаголи су непрелазни, те уз њих не иде акузатив предмета.

Ако пак такви глаголи исказују усмерење (правац) или промену стања, уз њих се употребљава акузатив правца.

Li transloĝiĝis en nian straton.  
Он се преселио у нашу улицу.

Akvo transformiĝas en vaporon.  
Вода се претвара у пару.

∴

Суфикс –um се употребљава када ниједан други суфикс не може да изрази тај појам.

folio	-лист	somero	-лето
foliumi	-прелиставати (књигу)	somerumi	-летовати
mastro	-домаћин, газда	proksime	-близу
mastrumi	-газдовати, управљати	proksimume	-приближно
komuna	-заједнички, а, о		
komunumo	-општина		

∴

Додат на корен речи, суфикс –il означава средство којим се обавља радња у корену речи.

tranĉi	-сећи, резати	veturi	-возити се
tranĉilo	-нож, сечиво	veturilo	-возило, кола

ludi	-играти се	razi	-бријати
ludilo	-играчка	razilo	-бријач, бритва

Реч ilo значи средство.

∴

Пре него што пређемо на песму, треба да кажемо да је у поезији дозвољено изостављање именичног наставка –о. Уместо њега пише се апостроф.

Исто тако, код одређеног члана се може изоставити а (те написати апостроф) ако се предлог испред њега завршава на самогласник (de, pri итд).

bati	-бити, тући, лупати	trankvila	-миран, спокојан, а, о
brusto	-груди, прса	salti	-скочити
venki	-победити	decidi	-одлучити
sufiĉe	-доста, довољно	konscienco	-савест
potenco	-сила, моћ	danĝero	-опасност
kiam	-када	tiam	-тада, онда
trovi	-наћи	fali	-пасти
gardi	-чувати	singarda	-опрезан, а, о
valori	-вредети	io	-нешто
nenio	-ништа		

### HO MIA KOR'!

Ho mia kor', ne batu maltrankvile,  
 El mia brusto nun ne saltu for!  
 Jam teni min ne povas mi facile,  
 Ho mia kor'!  
 Ho mia kor'! Post longa laborado  
 Ĉu mi ne venkos en decida hor'?  
 Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,  
 Ho mia kor'!

D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof  
 aŭtoro de Esperanto  
 (1859-1917)

∴

# Informoj

## **OMAĜE AL LA 150-JARA NASKIĜDATREVENO DE LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF**

La 28-an de decembro 2009 en Zavod za kulturu Vojvodine (Vojvodina Kultur-Instituto), Novi Sad, okazis kuna Literatura Renkontiĝo rilata al la 35-jara aktivado de Kunordiga Komitato de societoj/organizaĵoj pri lingvoj, literaturo kaj kulturo, al kiu apartenas ankaŭ Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, pere de sia Sekcio pri interlingvistiko.

Dum la kunveno Boriša Milićević, Institut-direktoro parolis okaze de la 150-jara naskiĝdatreveno de Esperanto-kreinto Lazaro Ludoviko Zamenhof, kaj pri aktivado de esperantistoj kaj ties organizaĵoj tra la mondo kaj en Serbio. Poste li recitis Zamenhof-poemon *Ho mia kor'* en E-o kaj serblingva traduko.

Cheestis pli ol kvindek verkistoj kaj literaturamantoj.

Menciendas ankaŭ ke la 28-an de novembro 2009, Juda Komunumo kaj Esperanto-societo "Radomir Klajić" okazigis en Beograd la kunvenon kun la tre bona ilustrita prelego okaze de la 150-jara naskiĝdatreveno de L. L. Zamenhof, kaj ĉeftrajte pri la historio de E-movado en Serbio. La prelegon prezentis s-ro Dimitrije Janičić, Institut-sekciestro pri Esperanto-movado. La muzikan programparton impresige prezentis la junaj geesperantistoj – membroj de Infanfilharmonio, el la familio Majstorović-Nestorović.

Ĉeestis plurdekoj da esperantistoj kaj E-amikoj.

*Boriša Milićević*

## **KUNA KUNVENO OKAZE DE UNESKO-TAGO DE GEPATRA LINGVO**

La 20-an de februaro 2010 en Zavod za kulturu Vojvodine (Vojvodina Kultur-Instituto), Novi Sad, Serbio okazis KUNA KUNVENO de reprezentantoj de Societoj pri lingvoj, literaturo kaj kulturo, okaze de UNESKO-Tago de gepatra lingvo (21-a de februaro). La kunvenon partoprenis la reprezentanto de Esperanto-Instituto (de Serbia Esperanto-Ligo), kiu regule kunlaboras. Li parolis pri Esperanto kiel grava perilo por diskonigo de verkoj el la serba lingvo kaj pluraj lingvoj de naciaj komunumoj (minoritatoj) en Vojvodino (Serbio).

Ĝis nun aperis pluraj E-tradukoj. Aparte menciindas:



– Lirika Poemaro el Vojvodino (Serbio) – 64 poemtradukoj de 43 serblingvaj, hungarlingvaj, slovaklingvaj, rumanlingvaj kaj rutenlingvaj vojvodinaj aŭtoroj.

– Bela Tibisko kaj Bunta Vojvodino – Kolekto de 30 poemtradukoj de 2 serblingvaj kaj 17 hungarlingvaj vojvodinaj aŭtoroj.

– La revuo Ŝvetlosc (Lumo) – 15 poemtradukoj de 11 rutenlingvaj vojvodinaj aŭtoroj.

– Multijeziĉki bilten MOST (La multlingva Bulteno PONTO) – en preskaŭ ĉiu numero aperas ankaŭ tekstoj rilataj al Esperanto aŭ tradukoj al Esperanto kaj el Esperanto. En la n-ro 9 estas 4 poemtradukoj.

Boriša Milićević

## PROFESORO FETTES EN BEOGRADO

### ESPERANTO HAVAS ESTONTECON



Mark Fettes, kanada universitata profesoro, en kadro de lia privata restado en Beogrado, estis, lundon la 22an de februaro gasto de beogradaj esperantaj societoj „Radomir Klajić“ kaj „La Suda Stelo“. Ĉeestis trideko da esperantistoj, al kiuj profesoro parolis pri siaj esperantaj spertoj kaj pri la estonteco de Esperanto.

– Kun intereso kaj plezuro mi venis al la semajna klubkunveno – diris la profesoro post trihora agrabla kaj interesa interparolado kun beogradaj esperantistoj.

Aparta demando de ĉeestantoj estis pri estonteco de Esperanto kaj ebleco de utiligo de internacia lingvo en landoj de Eŭropa Unio.

– Kiel mi argumentis jam antaŭ dudek jaroj en mia eseo pri la eŭropa Babelo, tiel longe kiel restos la ideoj pri demokratio, libero, justeco kaj paco, en la mensoj kaj la koroj de la homoj, same longe

Esperanto pluvivos kaj disfloros, eĉ se en malgranda skalo – diris profesoro Fetes.

Profesoro Fetes dum kvar tagoj de restado en Beogrado kun siaj familianoj (ankaŭ esperantistoj) ĉirkaŭiris Beogradon kaj kun la historio kaj monumentoj de Beogrado ilin konatigis profesoro Branko Despotoviĉ, beograda esperantisto kaj unika esperantlingva profesia turistgvidanto de nia urbo.

D. Janiĉiĉ

## LA TRIA MEZORIENTA KUNVENO EN TURKIO

Mi ĉeestis la duan MOK-on sed antaŭ tio mi instruis en Istanbulo-Uskudar en *Amerika liceo* gelernantojn, kiuj jam lernis Esperanton kun Murat Ozdizdar, ilia profesoro. Tiam ni sukcesis al Kunveno iri kun tri lernantoj.

Ĉi-jare mi same antaŭ la renkontiĝo estis dum du semajnoj en sama liceo instruanta Esperanton, kaj nun sukcesis al Kunveno venigi 10 gelernantojn. La kunveno okazis en Eskiŝehir inter la 2-a kaj la 5-a de aprilo 2010. Do, mi estas pro tio tre kontenta.

La Kunvenon ĉeestis ĝis 26 partoprenantoj kaj je nia kontento ankaŭ aperis 4-5 tiuj Turkoj, plenkreskuloj, kiuj lernis memstare aŭ rete kaj ĝis nun ne havis eblecon paroli kun *vivaj*, kiel ili diris, samideanoj.

La Kunveno estis sukcesa plejparte por gelernantoj ĉar la partoprenantoj multe engaĝiĝis por instrui ilin. Ekz. Renato Corsetti kaj Anna Lovenstein cedis de siaj prelegoj, ke ni havu pli da tempo por gelernantoj.

Finfine ni planas venontjare en januaro en Beogrado organizi por tiuj gelernantoj el Turkio Enkondukan seminarion por instruistoj de Cseh-metodo, kiun gvidos Tereza Kapista. Do, ni el Serbio estis plene engaĝitaj en la ĉi-jara Kunveno.

*Tereza Kapista*

## POSTNIKOV KAJ ZAMENHOF EN BANJA LUKO (BOSNIO)

Unua prezentado de teatraĵo „DEK TAGOJ DE KAPITANO POSTNIKOV“, laŭ romano de rusa verkisto Mikaelo Bronŝtejn kaj reĝisorado de Miliĉ Jovanoviĉ el Serbio, okazis la 23-an de marto en Banja Luka en urba teatro „Jazavac“ („Melo“). La teatraĵo estis en Esperanto kaj vizitantoj kiuj ne komprenis esperanton povis legi tradukon en serba lingvo sur la blanka tolaĵo. Ĉirkaŭ 200 spektantoj kelkfoje dum teatraĵo aplaudis kaj tre bone akceptis ĝin. Post teatraĵo en teatra halo

okazis solena koktelo kaj spektantoj kun aktoroj babilis kaj faris fotojn. Kelkaj el ili diris, ke ili nun pli multe scias pri lingvo Esperanto kaj ĝia historio.

Bosniaj ĵurnaloj abunde raportis pri interesa teatraĵo. Prezidanto de Komunumo de urbo Banja Luka, s-ro Slobodan Gavranoviĉ estis alta protektanto de la okazaĵo kaj li akceptis aktorojn kaj organizantojn el Centro "BeL@Espero"

Temas pri moderna teatraĵo de „SHELTER SCENO“ el Kragujevac (Serbio) kaj Centro "BeL@Espero" el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), kiu estas unika, ĉar en ĝia naskiĝo, preparo kaj prezentado partoprenis homoj el kelkaj landoj (Serbio, Rusio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Ĉeĥio).

Kapitano Postnikov, artileria oficiro de rusa cara armeo vivis en tempo antaŭ Oktobra revolucio. Li suferis kaŭze de siaj progresivaj ideoj ĉar li deziris, ke ĉiuj popoloj en la mondo interparolu per unu internacia lingvo Esperanto – klarigis al ĵurnalistoj post la prezentado de la teatraĵo ĉefa aktoro Saŝa Pilipoviĉ el Serbio. En la teatraĵo ankoraŭ ludas Miĉo Vrhovac el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino ) kaj Ljubica Gaŝparoviĉ el Kragujevac (Serbio).

Sian unuan prezentadon la teatraĵo havis dum la 94-a UK en Bjalistoko. En tiu ĉi jaro la teatraĵo estos prezentita en Sankt Peterburgo dum 26. Ruslanda esperantista kongreso kaj en Velika Gorica dum kongreso de Kroatia Esperanto-Ligo.

Miĉo Vrhovac

Malfruiĝinta novaĵo

## **MEMORMEDALO „JANUŜ KORĈAK“ AL NIAJ POLAJ GEAMIKOJ**

La Redakta komitato kun bedaŭro kaj pardonpeto sciigas ke lastjare el la *Beograda Verda Stelo* pro teknika eraro ellasis artikolo pri la distingo de niaj karaj geamikoj el Polando, Zofia Banet-Fornalova kaj Jirĵi Fornal.

Temas nome pri tio ke la estimataj geedzoj estis premiitaj per Memormedalo „Januŝ Korĉak“ por ilia longjara, sindonema kaj sukcesa laboro celanta konatigi la vivon kaj verkon de tiu meritplena modesta homo. Ni, beogradaj esperantistoj des pli ĝuas ĉar dank' al samideanino Zofia oni pli bone ekkonis la vivon de Korĉak. Nome, ŝia E-traduko de la libro „Interparolo en la fruktoĝardeno la 5-an de aŭgusto“ de la elstara

pola verkisto Igor Neverli estas tradukita serblingven kaj eldonita en nia urbo.

Kun multe da simpatio ni rememoras la ĉeeston de niaj pollandaj gesamideanoj en Beogrado dum la SAT-kongreso 2006. Zofia distingiĝis per siaj prelegoj kaj diskutoj; koncerne Jirĵi, liaj prezentadoj de monodramo de Korĉak restis neforgeseblaj.

Ni tutkore gratulas al Zofia kaj Jirĵi dezirante al ili pluan sukcesplenan agadon en Esperantujo.

Niaj esperantistoj

## **TURISMO EN SERBIO**

Verŝajne, vi ankoraŭ ne scias, ke ekzistas Esperanta paĝaro pri turismo en Serbio. Kvankam ĝi estas laborata, ĝi jam enhavas multajn utilajn informojn pri iuj turismaj lokoj kaj objektoj en nia lando. Kaj ĉiutage ĝi estas pli bona, pli informa. Tio estas la paĝaro TURISMA MONDO – SERBIO.

Ĝin metis en reton esperantistinoj el Jagodina Senka Tomiĉ kaj Jasenka Veliĉkoviĉ. Ĝi estas simpla, informa, bone ilustrita. Ankoraŭ ne enhavas gastlibron kaj vi ne povas rezervi lokon por ripozi, sed vi povas informiĝi pri diversaj lokoj kaj interesaj objektoj de turisma mondo en Serbio. Mi esperas, ke paŝo post paŝo ĝi fariĝos eksterordinare informa paĝaro por esperanta turista mondo en nia lando. Ĝis nun ekzistas kelkaj ligiloj por turismaj enterprenoj kaj mi esperas ke ili estos pli multnombraj dum la preparo de la paĝaro.

Por esperantistoj en Serbio kaj eksterlando estas grave, ke en la paĝaro estas troveblaj ĉiuj informoj pri Esperanto-societoj en Serbio kaj pri ĝisnunaj Esperanto-kongresoj de serbiaj esperantistoj. Nia organizo ne havas sian oficialan paĝaron kaj tie aperas unikaj informoj pri Esperanto-societoj en nia lando.

Mi gratulas al Senka kaj Jasenka por granda kaj pionira laboro kaj mi esperas ke ili daŭrigos la prilaboron de tiu valida kaj malofta paĝaro en Serbio.

## **"B.V.S." EN BULTENO DE ALBANAJ ESPERANTISTOJ**

En la lasta numero (februaro 2010, n-ro 87) de **Bulteno de la Albana Esperanto Instituto**, unika bulteno de albanaj esperantistoj estis aperigitaj tekstoj el nia "Beograda Verda Stelo". La ĉefredaktoro de

Bulteno aperigis tri tekstojn el nia Bulteno kaj foton faritan okaze de renkontiĝo de Tereza Kapista, mi kaj samideano Bardhyl Selimi en Beogrado, antaŭ kelkaj jaroj.

En la *Bulteno* aperis tekstoj: tradukita rakonto LETERO EL 1920 (verko de Ivo Andriĉ, tradukis Agnesa Eremija), teksto de Bora Simović KIEL MI FARIĜIS ŜTELISTO kaj du poemetoj de D. Janičić.

La Bulteno de albanaj esperantistoj aperigas tekstojn pri Esperanto-movado en la mondo, originalajn kaj tradukitajn tekstojn el Albanio kaj, kiel ĉi-foje, elekton de tekstoj el aliaj esperanto-publikaĵoj.

D. Janičić

## **JARKUNVENO DE LA SOCIETO**

La 15-an de marto 2010 okazis jarkunveno da societo „Radomir Klajić“. Dum la jarkunveno oni aprobis novan statuton da le societo. Oni devas, laŭ nova leĝo, denove registri la societon kaj oni bezonas adekvatan statuton.

Adem Jakupović

## **JARKUNVENO DE SEL**

La 27-an de marto 2010 okazis jarkunveno de SEL (Serbia Esperanto-ligo) en Jagodino, urbo de la pasintjara kongreso de serbiaj esperantistoj. Dum la jarkunveno estis elektitaj kvar novaj membroj de la administra komitato.

Adem Jakupović

## **PREPAROJ POR LA KONGRESO**

Nun, kiam alproksimiĝas la tempo de la kongreso (ĝi okazos de la 25-a ĝis la 27-a de junio en Beogrado) ni intensivigis preparojn por ĝi.

Bedaŭrinde, ĝis nun aliĝis malpli ol cent partoprenontoj, sed ni esperas, ke aliĝos pliaj partoprenontoj kaj, ke la kongreso estos bona.

Adem Jakupović

# Amuzo

## RAKONTO PRI KATO

Iu viro malamegas la katon de sia edzino, kaj li decidas liberiĝi de ĝi. Li metas ĝin en la auton, iras ĝis la deka strato, kaj tie li elmetas ĝin en la parkon kaj hejmeniras. Li alvenas hejmen, kaj jen, kion li vidas? La kato komforte promenas supren sur la ŝtuparo al la loĝejo.

Sekvatage li portas ĝin jam tridek stratojn for, sed kiam li alvenas hejmen, la kato jam trankvile ronronante kuŝas sur la katoarbo. La trian tagon li decidas iri tridek kilometrojn for, li turniĝas al flanka strateto, kaj ankaŭ tie li zigzagas ankoraŭ dek kilometrojn. Tie li eniras arbaron kaj elmetas la katon.

Post kelkaj horoj sonoras la telefono de la edzino:

– Kara mia, ĉu la kato estas hejme?

– Evidente, hejme.

– Donu al ĝi la telefonon, mi komplete erarvadis, kaj mi volas demandi de ĝi la vojon hejmen.

## MENSOGO

La edzo aĉetas roboton, kiu kapablas detekti mensogon perfekte. Li atendegas, ke la infano venu hejmen, kaj li povu elprovi ĝin. Alvenas la filo, li tuj pridemandas lin:

-- Kie vi restis?

-- Ni restis en la biblioteko por lerni.

La roboto iras al la knabo, kaj ĝi donas al li vangofrapon, ke li falas de sur la seĝo.

-- Nu, fileto mia, tio estas mensogodetekta roboto, do, ne mensogu plu! Kie vi estis?

-- Ni iris al la hejmo de teĉjo por spekti filmon.

-- Kion vi vidis?

-- La Stelojn de Eger.

La roboto iras al la knabo, kaj ĝi donas al li vangofrapon, ke li falas de sur la seĝo.

-- Do, kion vi rigardis?

-- Seksfilmon, kiun Steĉjo elŝutis el la interreto.

-- Vidu, fileto, mi en via aĝo neniam menogis al la paĉjo.

La roboto iras al la patro, kaj ĝi donas al li vangofrapon, ke li falas de sur la seĝo.

-- Nu, vidu! Li estas via filo! -- ekparolas ankaŭ la edzino.

La roboto iras al la edzino, kaj ĝi donas al ŝi vangofrapon, ke ŝi falas de sur la seĝo.

Ambaŭ ŝercojn esperantigis Imre Sabo (Budapeŝto)

## DANĜERO

1.

Japanoj manĝas tre malmulte da grasaĵo kaj havas malpli da korinfarktoj ol usonanoj kaj angloj.

2.

Meksikanoj manĝas multe da grasaĵo kaj havas malpli da korinfarktoj ol usonanoj kaj angloj.

3.

Ĉinoj trinkas tre malmulte da ruĝa vino kaj havas malpli da korinfarktoj ol usonanoj kaj angloj.

4.

Francoj ka italoj trinkas tre multe da ruĝa vino kaj havas malpli da korinfarktoj ol usonanoj kaj angloj.

5.

Germanoj trinkas multe da biero kaj manĝas multajn grasajn kolbasojn kaj havas malpli da korinfarktoj ol usonanoj kaj angloj.

### **KONKLUDO:**

**Manĝu kaj trinku, kion vi volas, nur ne parolu angle – ŝajnas, ke tio mortigas.**

Esperantigis Adem Jakupović



**95a Universala  
Kongreso de  
Esperanto**

Havano, 17-24 julio 2010



La 62-a kongreso de IFEF,  
Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, okazos  
en Sofio (Bulgario)  
de la 8-a ĝis la 15-a de majo 2010

La 43-a konferenco de ILEI  
okazos en Matanzas (Kubo)  
en 2010 (de la 11-a ĝis la 17-a de julio?)



La 3-a kongreso de serbiaj esperantistoj  
okazos en Beogrado (Serbio)  
de la 25-a ĝis la 27-a de junio 2010